Österreichische
Nationalbibliothek

Rememoro pri Solferino: Libraro pacifisma, 2

Presa Esperantista Societo : Societo "Pacifisto"

Paris; FRA 1906

Signatur: 702091-B.2

Barcode: +Z103819605

Zitierlink: http://data.onb.ac.at/rep/1000B2EA


Umfang: Bild 1 - 98

Nutzungsbedingungen

Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.

Österreichische
Nationalbibliothek
702.091-B
Esp-




ÖNB
+Z103819605

REMEMORO PRI SOLFERINO

De tiu ĉi libro tridek ekzempleroj estas presitaj
sur luksa papero kaj prese numerigitaj de 1 ĝis 30


ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK
WIEN



JEAN HENRI DUNANT

el Ĝenevo

Iniciatinto de la « Convention de Genève » de la 22-a de aŭgusto 1864, kaj de la Internacia « Ruĝa Kruco »

Naskiĝinta la 8-an de majo 1828.

(Kliŝo : Orell Füssli)

Libraro Pacifisma, Nº 2
ELDONATA DE LA SOCIETO « PACIFISTO »

HENRI DUNANT

Rememoro pri Solferino

el franca lingvo tradukis

A. VAILLANT KAJ P. FRUICTIER

KUN LA PERMESO DE L'AŬTORO

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, RUE LACÉPÈDE, 33

1906

702091-B
2

Al fervora esperantisto

A. Vaillant

kiu mortis antaŭ la fino de sia laboro

rememore dediĉas tiun tradukaĵon

lia kun- kaj post-laborinto

P. Fruictier.

ANTAŬPAROLO

Henriko Dunant, la fama aŭtoro de la « Rememoro pri Solferino », naskiĝis en Ĝenevo en 1828. La bona klero kaj filantropaj principoj ricevitaj de li en lia juneco, egale kiel lia natura energio kaj organizemo, estis bona fundamento por la disvolviĝo de la ideoj kaj inklinoj, kiuj alkondukis al lia fruktodona agado.

En 1859 okazis la fariĝo kiu definitive puŝis lin al la agado, kiun li ne ĉesigis dum sia tuta vivo, la agado por la malgrandiĝo de l' militaj malfeliĉoj aŭ, el pli larĝa vidpunkto, por la ekregno de la paco. Tiu fariĝo estis la batalo de Solferino, kie li unue organizis (en Castiglione) korpuson da volontuloj por forlevi, malplisuferigi, kaj bandaĝi la vunditojn.

Ekhavinte tiel la ideon pri konstanta organizo de tiaj volontaj kompatemularoj kaj ankaŭ pri aranĝebla interregna konsento koncerne la vunditojn, li prezentis sin al la franca marŝalo Mac-Mahon kaj poste al Napoleono III-a mem, kiu interesiĝis pri la projektoj de Dunant kaj tuj ordonis al sia armeo ke la malamikaj bandaĝantoj ne estu plu malliberigataj.

Baldaŭ, Dunant organizis Helpan Komitaton en Ĝenevo; baldaŭ li aperigis sian « Rememoro pri Solferino », kiu estis entuziasme akceptata kaj ĝoje aplaŭdata. Li renkontis tamen kontraŭstarojn kaj barojn, precipe de l'franca Milita Ministro. La filantropaj ideoj de l'nomita libro atingis multajn eŭropajn geprincojn, kun kiuj Dunant kunrilatiĝis ĉu skribe, ĉu parole; li ĉiam propagandis siajn ideojn, insistante pri

l'organizo de naciaj konstantaj komitatoj por la vunditoj, pri ilia internacia unuiĝo, kaj pri la neŭtraligo de l'militaj malsanuloj (li disvolvis siajn ideojn, nur ekmetitajn en la « Rememoro », en apartaj verkoj). La Ĝeneva « Societo de Publika Utilo » kreis komision por studi la demandon. Dume, Dunant mem havis la okazon paroli kun la Saksona Reĝo kaj konvinkis reprezentantojn de kelkaj aliaj regnoj trakti la aferon kun iliaj monarĥoj.]

Dunant tiom interesis la registojn pri sia demando, ke multaj nacioj sendis siajn delegitojn al la Ĝeneva Internacia Konferenco, kiu okazis en 1863. Tiu ĉi decidis la fondon de naciaj komitatoj kaj esprimis la deziron pri la neŭtraligo de la kuracantoj kaj kuracatoj kaj pri la akcepto de internacia signo de l'komitatoj; samtempe ĝi adresis universalan dankon al Dunant.

En 1864 okazis diplomata Internacia Kongreso pri la sama afero, ankaŭ en Ĝenevo, kies organizon entreprenis la Berna Federacia Konsilo dissendinta cirkulerojn preskaŭ al ĉiuj teraj regnoj. Tie definitive oni akceptis la projektojn de Dunant kaj kreis la « Ruĝan Krucon », kies komitatoj estas nun dissemitaj sur la tuta terglobo. La plua disvolvo de la ideoj de Dunant (ekz. por la maristaro) okazis en la Haga Konferenco de 1899.

Tiel, aparta homo inspirita de l'sento de bono kaj kompato al sia proksimulo, per sia propra senlaca agado atingis la efektivigon de siaj ideoj, kiu estas tiom granda pacema paŝo en la homara progreso. Tial vere la homaro kaj precipe la pacifistaro ŝuldas al tiu ĉi laboremulo merititan eternan memoron kaj dankon.



La rekompenco, tamen, alvenis malfrue.

En la fervora propagando, por kiu, dum kvar jaroj, li eldonis broŝurojn kaj artikolojn en ĉiuj lingvoj, kaj vojaĝis senhalte tra tuta Eŭropo, Dunant elspezis ĉion, kion li posedis ; kaj, dum longaj jaroj, oni aŭdis plu nenion pri tiu mo-

desta bonulo, al kiu sufiĉis la kontenteco de l'konscienco. Fine, en 1897, oni laŭvorte « eltrovis » lin en la svisa vilaĝo Heiden, kie li vivis mizere, en rifuĝejo por maljunuloj, preskaŭ sen alia rimedo ol malgranda pensio, kiun li ricevis de l'imperiestrino de Rusujo. Baronino de Suttner sendis tiam al la tutmonda ĵurnalaro, kaj speciale al la pacifistoj, alvokon por iniciati monoferadon, kiu kvietigu liajn lastajn jarojn. Kaj, en 1901, kiam la Nobel-premio de Paco, valoranta 208 000 frankojn, estis aljuĝata por la unua fojo, oni partigis ĝin inter Henri Dunant kaj Frédéric Passy.

Vere estas, ke multaj pacifistoj ne aprobis tiun decidon de l'Komitato Nobel. Ili kontraŭparolis ke la agado de Dunant ne nur ne estis pacifisma, sed eĉ povas havi efektojn kontraŭpacifismajn. Malpligrandigi la terurojn de milito estas efektive, laŭ ili, detrui unu el la plej efikaj kaŭzoj kiuj deturnas la homojn de ĝi, kaj, sekve, plilongigi la daŭron de ĝia regado. Kiel diras unu el la ĉefaj riprezentantoj de tiu ideo, S-ro H. H. Fried, la Ĝeneva Interkonsento estis nur « malgranda cedo de la registaroj al la nova ideo, kiu kontraŭbatalas la esencon mem de milito ». Sendube, ili ne malaprobas la humanan agadon de Dunant, kontraŭe; sed ili pensas ke ĝi ne estas esence « pacifisma », ke ĝi ne devis esti rekompencata per la premio de Paco, ke estas danĝere konfuzi pacifismon kun simpla humanemo.

La kontraŭa opinio estas montrata de la jenaj paroloj, kiujn skribis S-ro Ruyssen en la revuo *La Paix par le Droit*, en la momento kiam Dunant ricevis sian premion :

« . . . Lia gloro kreskis ĉiujare proporcie kun ĉiuj suferoj de kiuj lia verko liberigas, kun ĉiuj vivoj kiujn ĝi savas, kun ĉiuj sindonemoj kiujn ĝi naskas.

« Henri Dunant malpligrandigis la abomenaĵojn de l'milito ; Frédéric Passy batalis por igi ĝin neebla. Unu efektivigis pli ; la alia naskis pli malproksimajn kaj pli lumajn esperojn. Unu rikoltis jam ; la alia semis la estontajn rikoltojn ; kaj tial, ke estus arbitre kaj maljuste kompari tiel malsimilajn indecojn, la plenumantoj de la voloj de Nobel pravis metante identajn kronojn sur la kapojn de du maljunuloj, kiuj eluzis sian vivon militante kontraŭ milito. »

Interese estis montri ĉi tie la kontraŭajn juĝojn al kiuj estis kondukataj samfervoraj pacifistoj, pri la agado de Dunant. Kia ajn estos la konkludo de la leganto, pri la rilato inter ĝi kaj la pacifisma propagando, li opinios certe ke la *Rememoro pri Solferino,* montrante la abomenaĵojn de milito, estas utila propagandilo, kaj ke la nomo de Dunant devas esti benata, kiel tiu de unu el la plej sindonaj bonfarintoj al la homaro.

G. Kolowrat *kaj* G. Moch.

REMEMORO PRI SOLFERINO

Sangoverŝa venko apud Magenta malfermis pordojn de Milano por la franca militistaro, kiun urboj Pavia, Lodi, Cremona entuziasme akceptis. La Aŭstroj, lasinte liniojn de Adda, Oglio kaj Chiese, amasigis ĉe bordoj de rivero Mincio multan soldataron, kies komandadon energie prenis sur sin juna kaj kuraĝa imperiestro Francisko-Jozefo.

Reĝo de Sardinio, Viktor-Emanuelo, venis la 17-an de junio 1859-a en Brescia, kie kun grandega ĝojo lin akceptis loĝantaro vidanta en la filo de Karl-Alberto savanton kaj heroon. Dum morgaŭa tago, la imperiestro de Francoj eniris la saman urbon inter entuziasmaj krioj de popolo feliĉa montri sian dankecon al monarko, kiu helpas al ĝi por akiro de sendependeco.

La 21-an de junio, Napoleono III-a kaj Viktor-Emanuelo II-a eliris el Brescia, kiun iliaj armeoj estis forlasintaj dum la antaŭa tago. La 22-an, ili ekokupis Lonato, Castenedolo kaj Montechiaro. La 23-an vespere, Napoleono, kiu estis ĉefkomandanto, eldonis precizajn ordonojn, por ke la militistoj de la Sardinia reĝo, starantaj apud Desenzano kaj

formantaj la maldekstran flankon de la ligarmeo, paŝu la sekvantan tagon al Pozzolengo.

Marŝalo Baraguey-D'Hilliers estis ordonata paŝi al Solferino; marŝalo Mac-Mahon, duko de Magenta, al Cavriana, generalo Niel al Guidizzolo, marŝalo Canrobert al Medole, marŝalo Regnaud de Saint-Jean-d'Angely, kun la imperiestra gvardio, al Castiglione.

Kune, tiuj soldataroj atingis nombron da cent kvindek mil homoj kun kvar cent kanonoj.

La aŭstra imperiestro disponis en la lombardo-venecia reĝlando naŭ armeajn korpusojn, kiuj kune arigis ducent kvindek mil homojn, se oni enkalkulas la garnizonojn en Verona kaj Mantova. La tuj batalonta parto konsistis el cent sesdek mil homoj, subtenataj de kvin cent kanonoj.

La ĉef-kvartalo de imperiestro Francisko-Jozefo estis portita de Verona al Villafranca, poste al Valeggio. La 23-an, dum la vespero, la aŭstraj soldatoj ricevis ordonon retransiri Mincion dum la nokto, ĉe Peschiera, Salionze, Valeggio, Ferri, Goito kaj Mantova. La plej multa parto de l'armeo starigis sian kvartalon inter Pozzolengo kaj Guidizzolo por ataki la malamikojn inter riveroj Mincio kaj Chiese.

La aŭstra militistaro konsistis el du armeoj. La unuan komandis Feldzeugmeister grafo Wimpffen, estranta korpusojn gvidatajn de Feldmarŝaloj princo Edmondo Schwarzenberg, grafo Schaffgotsche ka

barono Veigl, kun kavaleria divizio de grafo Zeidwitz; ĝi estis la maldekstra flanko; ĝi starigis sin sur ĉirkaŭaĵo de Volta, Guidizzolo, Medole kaj Castel-Gioffredo.

La dua armeo estis komandata de grafo Schlick, estranta Feldmarŝalojn grafon Clam-Gallas, grafon Stadion, baronon Zobel kaj kavaliron Benedek, kun kavaleria divizio de grafo Mensdorff; ĝi estis la dekstra flanko kaj okupis Cavriana, Solferino, Pozzolengo kaj San-Martino.

Aŭstroj staris do, la 24-an matene, sur ĉiuj altaĵoj inter Pozzolengo, Solferino, Cavriana kaj Guidizzolo. Ili ordigis sian artilerion sur serio da mammontetoj formanta la centron de ataka linio, kiu ebligis al ilia dekstra kaj maldekstra flanko foriron ŝirmatan de tiuj fortikigitaj altaĵoj, kiujn ili kredis nekapteblaj.

Ambaŭ malamikaj armeoj, kvankam marŝante unu kontraŭ alia, ne atendis tiel baldaŭan renkontiĝon. La Aŭstroj, malĝuste informitaj, supozis, ke nur parto de la ligarmeo transiris riveron Chiese. Siaflanke la liganoj ne atendis tiun atakan revenon kaj ne kredis, ke ili trovos sin tuj antaŭ la armeo de l'aŭstra imperiestro. La esploroj, observoj, raportoj de antaŭesploristoj, leviĝoj per varmbalonoj faritaj dum la tago de la 23-a, montris nenian signon pri minacanta renkontiĝo.

La interfrapiĝo de l'armeoj aŭstra kaj franco-sardinia, en la vendredo 24-a de junio 1859-a, estis

do neatendita, kvankam militantoj ambaŭflanke konjektis baldaŭan kaj grandan batalon.

La aŭstra armeo, jam lacigita de malfacila paŝado dum nokto 23—24-a, devis elporti, tuj ĉe la tagiĝo, atakon de malamikoj kaj toleri varmegan veteron, malsaton kaj soifon, ĉar, escepte duobla porcio da brando, plej multo de l'Aŭstroj povis manĝi nenian nutraĵon.

La francaj soldatoj, jam moviĝinte antaŭ la matena krepusko, sorbis nenion alian ol kafon. Tial elĉerpiteco de la militantoj kaj precipe de la kompatindaj vunditoj estis ekstrema en la fino de tiu sangoplena batalo, kiu daŭris pli ol dekkvin horojn.

Ambaŭ armeoj estas elvekitaj.

Tricent mil homoj staras kontraŭe. La batallinio estas dekmejle longa.

Jam en la tria horo matena, korpusoj komandataj de marŝaloj Baraguey d'Hilliers kaj Mac-Mahon ekmoviĝas al Solferino kaj Cavriana.

Apenaŭ la antaŭaj kolonoj preteriris Castiglione, jam ili trovas sin antaŭ unuaj aŭstraj postenoj, kiuj ne cedas la lokon.

En ĉiuj flankoj, klarionoj ludas atakarion kaj tamburoj sonadas.

Imperiestro Napoleono, kiu pasigis la nokton en Montechiaro, rapidegas al Castiglione.

Je la sesa horo, la pafado serioze estas komencita.

Aŭstroj paŝas densamase, laŭ perfekta ordo, sur landvojoj. En aero flirtas iliaj standardoj nigraj kaj flavaj, sur kiuj estas brodita l'antikva imperiaglo.

La tago estas helega. En la franca armeo la itala suno lumigas brilajn armilarojn de dragonoj, gvidistoj, lancistoj, gvardiaj kirasuloj.

Tuj ĉe la komenciĝo de l'afero, imperiestro Francisko-Jozefo forlasis kune kun sia tuta stabo sian ĉef-kvartalon por iri al Volta. Li estas akompanata de l'arkidukoj el la Lotringa familio, inter kiuj estas ĉefduko de Toscano kaj duko de Modena.

Inter malfacilaĵoj de kampo ne konata de la franca armeo fariĝas la unua renkontiĝo. La soldatoj devas krei al si vojon tra plantaĵoj da morusarboj interplektitaj per alligiĝemaj vinberujoj, kiuj faras neeviteblajn baraĵojn. La tero estas trastrekita per grandaj defluiloj sekiĝintaj kaj per longaj muroj nealtaj sed tre larĝaj en sia malsupro. La ĉevaloj devas transsalti tiujn sulkojn kaj murojn.

El siaj montetoj, Aŭstroj ŝutas sur la malamikojn senpaŭzan hajlon da grenadoj, bomboj, kuglegoj. Kun fumo de kanonoj pafantaj kuglare miksiĝas teraĵo kaj polvo suprenpelata de miloj da kuglaĵoj. Francoj kuregas, atakante plej fortikajn lokojn, malgraŭ pafado de baterioj, kiuj frapas la teron per rapidaj batoj.

Dum brula varmo tagmeza, la bataloj okazantaj ĉiuloke fariĝas pli kaj pli furiozaj.

Densaj kolonoj ĵetas sin unu kontraŭ alia kun forto de ruiniga torento.

Multaj francaj regimentoj, en disa ordo, ĉirkaŭas la aŭstrajn masojn. Sed, simile al feraj muroj, tiuj ĉi kontraŭstaras kaj unue restadas neŝanceleblaj.

Tutaj divizioj demetas siajn ŝultrosakojn sur la teron por kuregi al malamikoj kun bajoneto antaŭen.

Se bataliono estas forpuŝita, ĝin anstataŭas alia ; ĉiu monteto, ĉiu altaĵeto, ĉiu roka supro estas kampo por obstinegaj bataloj.

Amasiĝas mortigitoj sur altaĵoj kaj en kavaĵoj. Aŭstroj kaj Liganoj paŝas unu sur alia, intermortigas sin super sangotegitaj kadavroj, buĉas per pafilŝtipoj, rompas kraniojn, malfermas ventrojn per glavoj aŭ bajonetoj. Nenia ĉeso en la miksbatalo, nenia kompato. Vunditoj mem defendas sin ĝis lasta momento. Fariĝas buĉado, batalaro inter homoj furiozaj, sangebriaj.

Iafoje, la batalado fariĝas pli terura pro alveno de rajdistaro pretergalopanta. La ĉevaloj, pli kompatemaj ol la rajdantoj, vane klopodas por eviti la viktimojn de tiuj buĉoj : ili dispremas sub siaj ferpiedoj mortintojn kaj mortantojn. Kun blekoj de ĉevaloj miksiĝas blasfemoj, kolerkrioj, doloraj aŭ malesperaj ĝemegoj.

Artilerio plenrapide sekvas la kavalerion, kiu traboras vojon tra kadavroj kaj vunditoj konfuze kuŝantaj sur la tero. La makzelo de unu el tiuj ĉi lastaj estas forŝirata; la kapo de alia, dispremata; la brusto de tria platiĝas. La membroj estas rompataj, pistataj; kampoj kovriĝas per homaj pecoj; la tero eltrempiĝas sange.

Francaj soldataroj surkuras plej viglofervore krutaĵojn, rokajn deklivaĵojn, spite de pafado, bomboj kaj kuglaro.

Apenaŭ kelkaj unuaklasaj rotoj, lacegaj, ŝvitoplenaj, kaptis unu monteton, atingis ĝian supron: tuj ili sin ĵetas kvazaŭ lavango sur Aŭstrojn, renversas, forpelas kaj persekutas ilin ĝis fundo de kavaĵoj.

Sed Aŭstroj reprosperas. Embuskiĝinte post domoj, preĝejoj, muroj de Medole, Solferino, Cavriana, ili heroe kontraŭbatalas kaj tre alproksimiĝas la venkon.

Bataloj senĉese rekomenciĝas, kaj en ĉiu loko furioze. Nenio haltigas, nenio paŭzigas la buĉadon. Oni reciproke mortigas sin pogrande, podetale. Bajonete kaptiĝas ĉiu krutaĵo; paŝe-post-paŝe defendiĝas ĉiu fortikaĵo. El malamikaj manoj oni forŝiras vilaĝojn, domon post domo, kajuton post kajuto; ĉiu el ili fariĝas sieĝejo; pordoj, fenestroj, kortoj estas buĉejoj.

Kanonkuglaro sendas morton ĝis en malproksimaj rezervitoj de l'Aŭstroj. Se tiuj ĉi forlasas la

kampon, ili cedas ĝin nur paŝe-post-paŝe kaj baldaŭ rekomencas atakon. Iliaj vicoj senĉese reformiĝas.

En la ebenaĵo, la vento pelas supren el la vojoj polvaĵarojn, kiuj, simile al densaj nuboj, mallumigas la tagon kaj blindigas la batalantojn.

La franca kavalerio ĵetas sin al la aŭstra; hulanoj kaj husaroj furioze interglavumas.

La obstinego estas tiel granda, ke ĉe kelkaj lokoj, post elĉerpiĝo de la kartoĉoj kaj rompiĝo de l'armiloj, oni batalas brake, batas sin ŝtone.

La plej fortikaj pozicioj estas kaptataj, perdataj, kaj rekaptataj por reperdiĝi kaj rekaptiĝi denove; ĉie falas homoj, kripligitaj, trapikitaj, traboritaj de kugloj, superŝutitaj de kuglegaĵo.

Inter tiuj bataloj, inter buĉoj senĉese rekomencataj, sonadas diverslingvaj blasfemoj, dirataj de diversnaciaj viroj el kiuj multaj estas devigitaj fariĝi mortigistoj en sia dudeka jaro!

La soldatoj de l'sardinia reĝo defendas kaj atakas fervore, per ekbataloj kaj atakoj daŭrigataj de la mateno, montetojn San Martino, Roccolo, Madona della Scoperta, kiuj kaptiĝas kaj rekaptiĝas kvin kaj ses fojojn. Iliaj generaloj Mollard, La Marmora, Della Rocca, Durando, Fanti, Cialdini, Cucchiari, de Sonnaz, kun ĉiuspecaj kaj ĉiugradaj oficiroj helpas al sia reĝo, antaŭ kies okuloj estas vundataj generaloj Cedale, Perrier kaj Arnoldi.

❦

La franca imperiestro ordonas, ke la korpusoj de Baraguey-d'Hilliers kaj Mac-Mahon kune kun la imperiestra gvardio samtempe ataku fortikaĵojn San Cassiano kaj okupu Solferino. *)

. . . Sed la brava aŭstra armeo multekoste pagigas la sukceson de la ligarmeo . . . Unu el ĝiaj herooj, princo Aleksandro de Hessen, post kuraĝega batalo ĉe San Cassiano, defendas kontraŭ ripetataj atakoj, la tri altaĵojn de l'monto Fontana . . . Apud Guidizzolo, princo Karlo de Windischgrätz metas sin al certa morto, klopodante rekapti, malgraŭ hajlo da kugloj, pozicion Casa Nova. Morte vundite, li ankoraŭ komandas, subtenata, portata de siaj bravaj soldatoj, kiuj vane faras al li remparon per siaj propraj korpoj.

. . . Marŝalo Baraguey-d'Hilliers fine eniras vilaĝon Solferino, kuraĝe defendatan de grafo Stadion . . .

La ĉielo mallumiĝis; densaj nuboj kovras la horizonton. Furioza vento leviĝas; ĝi forbalaas branĉojn de rompiĝantaj arboj. Malvarma pluvo, pelata de la ventego, kvazaŭ trombo trempas la militantojn elĉerpitajn pro malsato kaj laceco, dum polvaroj, hajlo, fulmoj, blindigas la soldatojn devigatajn batali ankaŭ kontraŭ elementoj . . . .

---

*) En la origanala verko, la aŭtoro forstrekis el tiu ĉi loko ĉirkaŭ 15 paĝojn, kiuj perdis sian nuntempan intereson.

Rim. de l'trad.

La armeoj de l'imperiestro Francisko-Jozefo paŝas returnen . . .

Dum la tuta batalado, la estro de la Habsburga familio montris mirindan trankvilecon kaj memregecon. Dum kaptiĝo de Cavriana, la aŭstra imperiestro trovis sin kune kun grafo Schlick kaj princo de Nassau sur apuda altaĵeto, Madonna della Pieve, kontraŭ preĝejo ĉirkaŭata de cipresoj. Sed ĉirkaŭ la vespero, ĉar la aŭstra centro malprosperis kaj la maldekstra flanko ne povis plu esperi, ke ĝi sukcesos okupi la pozicion de la Liganoj, la ĝenerala returniro estis decidata. En tiu ĉi grava momento, imperiestro Francisko-Jozefo, ĉirkaŭ kiu pluvis kugloj kaj kuglegoj dum la tuta tago, iris kun parto de sia stabo al Volta, dum arkidukoj kaj heredonta ĉefduko de Toscano revenis al Valeggio.

La aŭstraj oficiroj batalis kvazaŭ leonoj. Kelkaj pro malespero lasis sin mortigi, sed multekoste vendante sian vivon. La plej multo reatingas siajn regimentojn, kovrite per sango de siaj propraj vundoj aŭ de la malamikoj. Al ilia braveco ni devas fari la merititan laŭdon.

. . . Guidizzolo restis okupata de Aŭstroj ĝis la deka horo vespera . . . La vojoj estas kovrataj de pakaĵoj, veturiloj, ekvipaĝoj, artileriaĵoj. La transporta ilaro estas savata per rapida konstruo de provizoraj pontoj. La unuaj aŭstraj vunditaroj, konsistantaj el homoj malforte trafitaj, komencas

eniri en Villafranca. La pli grave vunditaj soldatoj sekvas ilin . . . Aŭstraj kuracistoj kaj iliaj helpistoj rapidege bandaĝas vundojn, donas kelkan nutraĵon al vunditoj kaj sendas ilin per fervojaj vagonoj al Verona, kie la embarasiĝo fariĝas terura.

Kvankam, dum sia returniro, la aŭstra armeo klopodas por forporti ĉiujn vunditojn, kiujn ĝi povas transporti (kaj je kiel grandaj suferoj!) tamen miloj da ili restas kuŝantaj, forlasite sur la tero malsekigita de ilia sango!

La ligarmeo ordigas sin ĉe la kaptitaj lokoj... Dum la fino de la tago, kiam la vespera ombro eketendiĝas super tiu larĝa buĉaĵo, pli ol unu oficiro, pli ol unu soldato franca serĉas tie ĉi kaj tie kamaradon, samurbanon, amikon. Kiam li renkontas konatan vunditon, li surgenuiĝas al li, klopodas rekonsciigi lin, forviŝas lian sangon, bandaĝas vundon kiel eble plej bone, ĉirkaŭas per poŝtuko rompitan membron; sed malofte li sukcesas trovi akvon por la kompatindulo.

Kiom da silentaj larmoj elfluis dum tiu ĉi malgaja vespero, dum ĉia falsa fiereco, ĉia moktimo estis for.

Dum la batalo, provizoraj vunditejoj aranĝitaj ĉu en farmdomoj, preĝejoj, monaĥejoj apudaj, ĉu en libera aero, sub ombro de kelkaj arboj, akceptas vunditajn oficirojn kaj suboficirojn, kiuj rapide ricevas provizoran bandaĝon; post ili venas soldatoj... kiam tio estas ebla. Tiuj el la lastaj, kiuj

ankoraŭ kapablas paŝi, mem iras al tiuj ambulancoj. La aliajn oni portas per litkadroj aŭ homportiloj ; ili estas malfortigitaj de sangellaso, doloro, longedaŭra sennutreco, spirita bato ĵus eltenita. Dum la batalo, flageto, starigita sur alta loko, montras la postenon por vunditoj kaj ambulancojn de la batalantaj regimentoj. Bedaŭrinde la soldatoj nur malmulte konas la koloron de la vundulflago, nek la koloron de l'ambulanca flago de la malamikoj, ĉar la koloroj estas malsamaj laŭ la diversaj nacioj. La bomboj alvenas al ili, indulgante nek kuracistojn, nek vunditojn, nek vagonojn ŝarĝitajn per pano, vino, viando, ĉarpio.

Altaĵoj starantaj de Castiglione ĝis Volta brilas per miloj da fajroj, kiuj estas nutrataj per pecoj el aŭstraj pafaĵvagonoj kaj per dikegaj arbobranĉoj rompitaj de la ventego aŭ de kugloj. La soldatoj sekigas siajn akvoplenajn vestojn ; poste, lacegaj, elĉerpitaj, ili ekdormas sur ŝtonetoj aŭ tero.

Kiom da konsternantaj epizodoj, kortuŝantaj okazoj, ĉiaspecaj disreviĝoj !

Jen estas batalionoj sen nutraĵo, rotoj mankantaj ĉion plej necesan pro perdo de la ŝultrosakoj. Aliloke, akvo mankas. Tamen soifo estas tiel fortega, ke oficiroj kaj soldatoj uzas akvon el ŝlimaj, eĉ sangigitaj, terakvujoj ; ĉie, vunditoj postulas akvon.

Tra silento de la nokto aŭdiĝas ĝemoj, mal-

laŭtaj spiroj plenaj de angoro kaj doloro, korŝiraj voĉoj kriantaj por helpo.

Kiu povos iam pentri agoniaron de tiu abomena nokto!

La suno, en la 22-a de junio 1859-a, lumis super unu el la plej teruraj vidaĵoj imageblaj.

La batalkampo estas kvazaŭ tegita per kadavroj homaj kaj ĉevalaj. Ili estas kvazaŭ semitaj sur la vojoj, defluejoj, kavaĵoj, densaĵoj, herbejoj, precipe apud vilaĝo Solferino.

La rikoltaĵoj estas ruinegitaj, la grenoj surpaŝitaj, la bariloj renversitaj, la fruktejoj detruitaj.

Ie kaj tie oni trovas sangajn marĉetojn.

La vilaĝoj estas senhomaj; ili surhavas postsignojn de kugloj, bomboj, grenadoj.

La domoj, kies muroj estas traboritaj de kuglegoj kaj larĝe breĉigitaj, estas ŝancelitaj, ruinitaj.

La loĝantoj, kies plej multo pasigis preskaŭ dudek horojn rifuĝe en siaj keloj, sen lumo, sen nutraĵo, komencas eliri. La freneza mieno de tiuj kompatindaj vilaĝanoj atestas ilian longan teruradon.

La tero estas kovrita per ĉiaspecaj disrompaĵoj, ekipaĵoj, sange makulitaj vestaĵoj.

La malfeliĉaj vunditoj, kiujn oni relevas dum la tago, estas palaj, blankegaj, malviglegaj.

Unuj, precipe la grave vunditaj, rigardas senpense; ili ŝajnas ne kompreni tion, kion oni diras; ili fiksas senpensan rigardon sur la helpantoj.

Aliaj, en tre danĝera nerva ŝoko, estas skuataj de konvulsia tremado.

Aliaj ankaŭ, kun nekovritaj vundoj, kie jam aperis brulumo, estas kvazaŭ frenezaj pro doloro; ili petas, ke oni finmortigu ilin, kaj, kun vizaĝo distirata, tordas sin en lasta turmentado de l'agonio.

Aliloke kuŝas kompatinduloj, teren renversitaj de kugloj aŭ kuglegoj, kaj kies brakoj, kruroj, estas frakasitaj de surruliĝintaj kanonoj.

La frapo de cilindra kuglo diseksplodigas ostojn, tiel ke la deveninta vundo estas ĉiam tre danĝera. La grenadpecoj, la konusaj kugloj faras vundojn ekstreme dolorajn, kies internaj difektegoj estas terurigaj. Ĉiaspecaj rompaĵoj, ostopecoj, tero, plumberoj, pecoj de vestoj, ekipaĵoj, ŝuoj, pligravigas, incitas la vundojn de la paciento kaj multobligas lian suferadon.

Trairante tiun vastegan kampon de la hieraŭaj bataloj, oni ĉiupaŝe renkontas, meze de sensimila konfuzaĵo, nedireblajn malesperojn, ĉiaspecajn suferojn.

Kelkaj el la batalionoj, kiuj demetis siajn ŝultrosakojn dum la batalo, fine retrovas ilin; sed oni forrabis ĉion entenitan. Dum la nokto vagistoj ĉion elŝtelis. Grava perdo por tiuj malriĉuloj, kies tukoj kaj uniformoj estas makulitaj, malpuraj, disŝiritaj. Ne nur ili trovas sin senigitaj je siaj vestaĵoj, sed ankaŭ je siaj malgrandaj ŝparaĵoj, ilia tuta riĉaĵo,

kaj je la objektoj karaj al ili, malgrandaj memoraĵoj pri familio, patrujo, donitaj de patrinoj, fratinoj, fianĉinoj.

En kelkaj lokoj, la mortintoj estas senvestigitaj de la ŝtelistoj, kiuj ne ĉiam indulgas la vunditojn ankoraŭ vivantajn.

Krom tiuj doloraj vidaĵoj estas ankoraŭ pli dramaj.

Tie, maljuna eksoficiro, generalo Le Breton, vagadas, serĉante sian bofilon, generalon Douay, vunditan, kiu forlasis lian filinon, sinjorinon Douay, meze de la ĝenerala milita tumulto kaj en plej kruela maltrankvileco. Aliloke, kolonelo de Maleville, trafita ĉe Casa Nova, elspiras. Tie ĉi, kolonelo de Genlis kuŝas kun danĝera vundo elvokinta bruligan febron. Artileria leŭtenanto de Selve, elirinta el milita lernejo antaŭ kelkaj semajnoj, estas amputata je dekstra brako sur la batalejo mem, kie li vundiĝis.

Mi helpas flegi kompatindan ĉefserĝenton de la Vincennes'aj ĉasoroj, kies ambaŭ kruroj estas kugle traboritaj. Lin mi denove renkontos en Brescia hospitalo ; sed li mortos, transirante Monte Cenisio.

Leŭtenanto de Guiseul, kiun oni kredis mortinta, estas relevita ĉe la loko mem, kie, falinta kun sia standardo, li kuŝis svene. Sentima subleŭtenanto Fournier, el la gvardiaj voltiĝeroj, grave vundita, finas en sia dudeka jaro militistan karje-

ron komencitan je sia deka jaro per volonta dungiĝo en la fremdan legion. Oni enterigas komandanton de Pontgibaud, kiu mortis dum la nokto, kaj junan grafon de Saint-Paer, kiu atingis la batalionestran gradon apenaŭ sep tagojn antaŭe. Artileria generalo Auger estas portata en ambulancon Casa Morino. Lia maldekstra ŝultro estas frakasita de sescola kuglego, kiu restis enŝovita dum dudek kvar horoj en la internaĵo de l'akselaj muskoloj. Kondukite en Castiglione, li estis atakata de gangreno kaj pereis pro sekvoj de la enartika fortranĉo de la brako. Ankaŭ en Castiglione estas portataj, grave vundite, generalo de Ladmirault kaj generalo Dieu.

La manko de akvo estas pli kaj pli granda. La suno brulas, la defluejoj estas sekigitaj. La soldatoj havas nur trinkaĵon malklaran kaj malsanigan por kvietigi sian soifon. En la lokoj, kie oni trovas eĉ la plej maldikan akvoflueton aŭ fontanon gute fluantan, gardistoj, kun ŝargita pafilo, klopodegas por konservi tiun akvon por la plej urĝaj bezonoj.

Vunditaj ĉevaloj, kiuj perdis sian rajdinton, vaginte dum la tuta nokto, trenas sin al siaj kolegoj, de kiuj ili ŝajnas peti helpon. Ilin oni mortigas per kuglo.

Unu el tiuj noblaj kuristoj venas sola en mezon de franca roto; riĉa mantelujo fiksita sur la selo montras, ke ĝi apartenas al princo von Isenburg.

Poste oni trovas la vunditan princon mem; sed akurataj flegoj ebligos, ke post grava malsano, li reiros Germanujon, kie lia familio, seninforme, kredis lin mortinta kaj funebradis lin.

Inter la mortintoj, kelkaj havas kvietan vizaĝon: ili estas la homoj, kiuj subite trafitaj, mortis senprokraste. Sed tiuj, kiuj ne tuj pereis, havas membrojn rigidajn, torditajn de l'agonio; ilia korpo estas kovrita de makuloj; iliaj manoj fosis la teron; la okuloj estas larĝe malfermitaj, senprudentaj; konvulsia kuntiriĝo malkovras iliajn kunpremitajn dentojn.

Tri tagojn kaj tri noktojn oni pasigas por enterigi la mortintojn, kiuj restis sur la batalkampo.

Sur tiel larĝa spaco, multo da kadavroj kaŝitaj en kavaĵoj, maskitaj de densaĵoj aŭ deklivaĵoj, estas ekviditaj nur tre malfrue. Ili ellasas, kiel ankaŭ la mortintaj ĉevaloj, haladzojn.

En la franca armeo, ia kvanto da soldatoj estas ĉiurote ordonata enterigi la mortintojn. Laŭ eblo, soldatoj el sama korpuso devas relevi siajn samkorpusanojn. Ili enskribas la stampan nombron de la vestaĵoj de la mortinto. Poste, helpate por tiu peniga tasko de pagataj lombardaj kamparanoj, ili metas la kadavron en komunan fosaĵon. Bedaŭrinde, ĉio kredigas, ke, pro neevitebla rapidado en tiu malloga laborado, pro senzorgeco, malatentemo de la pagatoj, pli ol unu vivanto estis enterigata kune kun la mortintoj.

La leteroj, paperaĵoj, ordenaĵoj, mono, poŝhorloĝo trovitaj ĉe oficiroj estas sendataj al iliaj familioj. Sed la multegeco de la enterigotaj korpoj malebligas la fidelan plenumadon de tiu tasko.

Filo, idolo de liaj gepatroj, edukita kaj vartita dum multaj jaroj de amema patrino, kiu maltrankviliĝis pro la plej malgrava malsanetiĝo; brila oficiro, amegata de sia familio, lasinta hejme edzinon, infanojn; juna soldato, kiu ĵus forlasis sian fianĉinon kaj preskaŭ ĉiam sian patrinon, fratinojn, maljunan patron; jen li kuŝas en la koto, sur la polvo, trempata de sia sango. Pro vundo ĉe la kapo, lia vizaĝo fariĝis nerekonebla. Li agoniadas, li elspiradas kruele suferante, kaj lia korpo, nigra, ŝvelinta, abomena, ĵetita en apenaŭ ekfosita kavaĵo, estas kovrata per iom da kalko kaj tero. La rabobirdoj ne respektos liajn piedojn kaj manojn elirantajn el la tero malseka, el la krutaĵo kiu estas lia tombo. Oni revenos, oni realportos teron, oni eble starigos lignan krucon super lia ripozejo, kaj ĝi estos ĉio.

La kadavroj de la Aŭstroj, vestitaj de kapotoj kotmakulitaj, de toljakoj ŝiritaj, de blankaj tunikoj sange ruĝigitaj, kuŝas kvazaŭ pomile semitaj sur la montetoj kaj ebenaĵoj apud Medole. Nuboj da korvoj glitflugas super tiuj korpoj, esperante el ili sian nutraĵon.

Oni amasigas ilin pocente en grandajn komunajn fosaĵojn.

Aŭstraj soldatoj malforte vunditaj, junaj unuajaraj rekrutoj, lasis sin teren pro laceco kaj malsateco, veninte ekster atingo de la pafado; poste, malfortigitaj de la sangellaso, ili mizere pereis pro elĉerpiĝo kaj malsato.

Malfeliĉaj patrinoj, en Aŭstrujo, Hungarujo, Bohemujo, via doloro estos granda kiam vi sciiĝos, ke viaj infanoj mortis, sur malamika tero, senzorge, senhelpe, senkonsole !

La sorto de la aŭstraj kaptitoj estas tre malgaja. Kondukataj kvazaŭ simpla brutaro, ili estas amase sendataj kun forta gardistaro al Brescia, kie ili fine trovas ripozon, se ne bonan akcepton.

Kelkaj francaj soldatoj volas perforti hungarajn kaptitojn, kiujn ili kredas esti Kroatoj, dirante furioze, ke tiuj « glupantalonuloj », laŭ ilia esprimo, ĉiam finmortigas la vunditojn. Mi prosperis elŝiri el iliaj manoj tiujn malfeliĉajn kaptitojn tute tremantajn.

Sur la batalkampo kelkaj aŭstraj oficiroj ricevas permeson konservi sian glavon. Ili estas nutrataj same, kiel la francaj oficiroj. Kelkaj soldatoj de la ligarmeo frate dividas siajn biskvitojn kun malsategantaj kaptitoj. Eĉ kelkaj ŝarĝas vunditojn sur sian dorson por ilin porti al ambulancoj. Apud mi leŭtenanto de la gvardio bandaĝas per sia blan-

ka poŝtuko la kapon de Tirolano apenaŭ kovritan per malnova tuko malpura kaj disŝirita.

Dum la antaŭa tago, ĉe la plej forta miksbatalo, komandanto de La Rochefoucauld-Liancourt, sentima Afrika ĉasoro, kuris kontraŭ hungaraj amasoj; sed lia ĉevalo estis trafrapata de kugloj, li mem trafata de du pafoj kaj kaptata de Hungaroj. Sciiĝante, ke unu La Rochefoucauld estas kaptita de la soldatoj, la Aŭstra imperiestro ordonis, ke oni agu plej afable kun li kaj donu la plej bonajn flegojn.

La Intendantaro pli-malpli bone daŭrigas relevigi la vunditojn. Tiuj ĉi, bandaĝitaj aŭ ne, estas portataj per muloj aŭ portiloj al la vilaĝaj kaj vilaĝegaj ambulancoj plej apudaj de la loko, kie ili falis.

En tiuj domaroj, ĉio, preĝejoj, monaĥejoj, domoj, placoj, kortoj, stratoj, promenejoj, estas uzata por provizoraj vunditejoj.

En Carpenedole, Castel-Goffredo, Medole, Guidizzolo, Volta, kaj apudajn lokojn alvenas granda kvanto da vunditoj. Sed la plej multo estas portata al Castiglione, kien la malplej kripligitaj jam prosperis trenadi sin.

Jen la longa procesio de veturiloj de l'Intendantaro, ŝarĝitaj per soldatoj, suboficiroj kaj oficiroj ĉiagradaj, kune kunfuzitaj: rajdistoj, piediruloj, artileristoj; sangokovritaj, lacegaj, disŝiritaj, polvo-

tegitaj. Ĉiu skuo de la veturiloj trudas al ili novan suferon.

Poste muloj venas trote; ilia irado ĉiuminute tiras akrajn kriojn el la gorĝo de la malfeliĉaj surportatoj.

Kelkaj mortas dum la irado.

Iliaj kadavroj estas metataj sur la randon de la vojo. Al aliaj oni lasas la zorgon enterigi ilin. Tiuj mortintoj estos enskribataj, kiel « malaperintaj ».

La vunditoj estas sendataj al Castiglione. De tie ili devas esti kondukataj al hospitaloj en Brescia, Cremona, Bergamo, Milano kaj aliaj urboj lombardaj, kie ili ricevos la regulajn flegojn kaj estos laŭbezone amputataj. Sed ĉar la transportaj rimedoj estas tro malmultaj, oni devas atendigi ilin dum kelkaj tagoj en Castiglione. Tiu ĉi urbo, kie la konfuzaĵo superas ĉion imageblan, baldaŭ fariĝas por Francoj kaj Aŭstroj, vastega provizora hospitalo.

En la batala tago, la ambulanco de la granda ĝenerala kvartalo aranĝis sin tie. Kestoj da ĉarpio estas malfermitaj; aparatoj kaj medikamentoj pretigitaj. La loĝantoj donas ĉion, kion ili disponas je kovriloj, tolaĵoj, matracoj, pajlaĵoj.

La hospitalo de Castiglione, la monaĥejo, la soldatejo San Luigi, la preĝejo de la Kapuĉenoj, la kazerno de la ĝendarmoj, la preĝejoj Maggiore,

San Giuseppe, Santa Rosalia, estas plenigitaj per vunditoj, kuŝigitaj, amasigitaj sur pajlaĵo.

Oni aranĝas por ili pajlaĵon ankaŭ en la kortoj, sur publikaj placoj. Oni rapidege starigas tabulajn tegmentojn kaj etendas tolaĵojn por ilin ŝirmi kontraŭ varmega suno.

La privataj loĝejoj baldaŭ estas ambulancigataj. Oficiroj kaj soldatoj estas tien akceptataj de la loĝantoj.

Kelkaj el tiuj ĉi lastaj trakuras elmeme la stratojn, serĉante kuraciston por siaj gastoj. Poste, aliaj iras kaj venas en la urbo, konsterne, kaj insiste petas, ke oni forprenu el ilia domo kadavrojn, el kiuj ili ne scias kion fari.

Kelkaj francaj kirurgoj, restintaj en Castiglione, helpataj de junaj kuracistoj italaj kaj de militistaj vunditistoj, metas aparatojn kaj faras bandaĝojn.

Sed ĉio ĉi estas tre malsufiĉa.

La nombro de la vunditaroj fariĝas tiel granda, dum la sabata tago, ke la Administracio, la urbanoj kaj la malmulta soldataro lasita en Castiglione estas nekapablaj sufiĉi por tiom da mizeraĵo.

Tiam okazas malgajegaj scenoj. Estas akvo, estas nutraĵo; kaj tamen vunditoj mortas pro malsato kaj soifo! Estas multa ĉarpio, sed ne sufiĉe da manoj por meti ĝin sur la vundojn! La plej multo de la armeaj kuracistoj devis foriri al Ca-

vriana ; la vunditistoj mankas kaj la helpantoj estas malsufiĉaj en tiu malfacila momento.

Oni do devas, bone aŭ malbone, organizi volontan servantaron. Sed tio estas malfacila ĉe tia konfuzaĵo, kiun pligrandigas paniko de la Castiglione'anoj ankoraŭ pligraviganta la mizerecon de la vunditoj. Tiu paniko estas kaŭzita de vere sensignifa cirkonstanco.

Laŭ tio, ke ĉiu korpuso de la franca armeo rearanĝis sin, post ordigo de la tendaro, oni formis, en la tago post la batalo, arojn da kaptitoj, kiuj estis sendataj al Brescia tra Castiglione kaj Montechiaro. Nu, la loĝantoj en Castiglione kredis, ke unu kaptitaro venanta el Cavriana kune kun husaroj, estas la aŭstra armeo amase returnen venanta. Alarmo estis farata de konsternitaj vilaĝanoj, helpaj kondukistoj de pakaĵoj, vagaj vendistoj, kiuj sekvas la militantajn soldatojn.

Tuj la domoj estas fermataj, loĝantoj enŝlosas sin hejme, bruligas trikolorajn flagojn, kiuj ornamis la fenestrojn, kaŝas sin en keloj aŭ sub tegmentoj. Unuj forkuras sur kamparon kun siaj edzinoj kaj infanoj, kunportante sian plej multekostan posedaĵon. Aliaj, malpli konfuzitaj kaj pli sagacaj, restas hejme, enaranĝas la unuajn aŭstrajn vunditojn, kiujn ili renkontas kaj superŝutas ilin per afablaĵoj kaj flegadoj.

Sur stratoj, sur vojoj, ŝtopitaj per konfuzaĵo da veturiloj por vunditoj, da provizaĵaroj, plenra-

pide forkuras ĉaroj, disgalopas ĉevaloj, meze de timaj, koleraj, doloraj krioj. Pakveturiloj estas renversataj. Panoj, biskvitoj falas en defluejojn. Helpaj kondukistoj maljungas la ĉevalojn, kaj, maltirante la bridojn, elkuras sur la vojo al Brescia. Ili renkontas ĉaretojn da nutraĵoj kaj arojn da vunditoj. Tiuj ĉi lastaj, superpaŝataj, freneziĝantaj pro teruro, petegas, ke oni forkonduku ilin. En la urbo, kelkaj el ili, ne aŭskultante la ordonojn, forĵetas siajn bandaĝojn, eliras ŝanceliĝante el preĝejoj, ekpaŝas sur stratojn, kie ili estas baldaŭ puŝegataj, kontuzataj, kaj fine falas pro elĉerpiĝo kaj doloro.

Kiom da agonioj kaj suferoj dum la tagoj 25, 26 kaj 27-a de junio !

Vundoj venenigitaj de varmo, de polvo, pro manko de akvo kaj flegoj, fariĝis doloregaj.

Sufokigaj haladzoj malbonigas aeron, spite de klopodoj por konservi en bona stato la vunditejojn.

Veturilaroj, senditaj al Castiglione, daŭre alkondukas ĉiukvaronhore novajn vunditarojn ; la malsufiĉeco de la flegistoj kaj helpistoj estas kruele sentata.

Spite l'aktiveco de l'Intendantaro, kiu organizas transportadon al Brescia per bovveturiloj ; spite la propramova zorgado de Castiglione'anoj, kiuj transportas malsanulojn, foriroj estas multe malpli multaj ol alvenoj kaj la amasiĝo senĉese pligrandiĝas.

Sur kaheloj de la Castiglione'aj preĝejoj, flanko ĉe flanko estas metitaj ĉiunaciaj viroj; Francoj, Germanoj, Slavoj, Araboj estas provizore amasigitaj ĝis en fundo de la kapeloj. Multaj jam ne havas forton sufiĉan por movi sin kaj povas nek moviĝi nek iom ŝoviĝi pro la mallarĝeco de la spaco, kie ili kuŝas. Ĵuroj, blasfemoj, krioj tradukeblaj per nenia esprimo, sonadas sub arkaĵoj de la sanktejoj.

« Ha, Sinjoro! Kiom mi suferas », diras al mi kelkaj el tiuj kompatinduloj; « oni forlasas nin, oni lasas nin mizere pereadi, kaj tamen ni brave batalis! » — Ili povas neniel ripozi, malgraŭ la sendormaj pasintaj noktoj kaj la elportitaj lacigoj. Je tia mankeco ili petegas helpon, kiu ne estas donata. Kelkaj tordas sin pro malespero en konvulsioj finiĝontaj per tetano kaj morto. Aliaj, kredante ke la malvarma akvo verŝata sur iliajn pusoplenajn vundojn, elvokas vermojn, kiuj montras sin grandamase, rifuzas, ke oni malsekigu iliajn bandaĝojn. Aliaj ankaŭ, havinte la favoron esti bandaĝataj ĉe la provizoraj vunditejoj de la batalkampo, ne estas plu flegataj dum la deviga haltado en Castiglione, kaj ĉar tiuj tolaĵoj ekstreme streĉitaj pro la estontaj skuoj dum la vojirado, ne estas ŝanĝitaj, ili suferas veran turmentadon.

Tiuj ĉi, kies vizaĝo estas nigre kovrata de muŝoj plenigantaj aeron kaj gluiĝantaj sur la vundoj, ĉiuflanken ĵetas senprudentajn rigardojn. Sed

neniu respondas al ili. Ĉe aliaj, kapoto, ĉemizo, karno kaj sango formis densan mason, kiun oni ne povas forigi.

Tie ĉi kuŝas soldato tute senvizaĝigita ; lia lango elpendas el lia rompita makzelo. Li skuetas sin kaj volas stariĝi ; mi malsekigas lian sekiĝintan palaton kaj malmoliĝintan langon ; kaptinte plenmanon da ĉarpio, mi trempas ĝin en sitelon portatan post mi kaj elpremas akvon el tiu kvazaŭspongo en la senforman malfermaĵon, kiu anstataŭas lian buŝon.

Tie kuŝas malfeliĉulo, kies parto de l'vizaĝo, nazo, lipoj, mentono, estas fortranĉitaj de glavbato. Nekapabla paroli, duonblinda, li faras signojn mane kaj per tiu kortuŝega pantomimo akompanata de gorĝaj sonoj, tiras al si atenton. Mi donas al li trinki, fluigante malforte sur lian sangokovritan vizaĝon iom da pura akvo.

Tria, kun malfermita kranio, elspiras, disverŝante sian sangon sur la preĝejajn kahelojn. Li prezentas abomenan vidaĵon ; liaj sammalfeliĉanoj forpuŝas lin piede, ĉar li ĝenas la preteriradon. Mi ŝirmas liajn lastajn vivmomentojn kaj kovras per poŝtuko lian kompatindan kapon, kiun li ankoraŭ movas iomete.

Kvankam ĉiu domo fariĝis vundulejo kaj ĉiu familio dediĉis sin por flegi vunditajn oficirojn, kiujn ĝi kolektis, tamen mi sukcesas, jam dimanĉe

matene, grupigi kelkajn popolvirinojn, kiuj plej akurate partoprenas klopodojn faratajn por helpi tiom da miloj da senzorgaj vunditoj. Oni devas doni manĝaĵon, kaj antaŭ ĉio trinkaĵon, al viroj, kiuj laŭvorte mortiĝas pro malsato kaj soifo; oni devas bandaĝi iliajn vundojn, lavi tiujn sangokovritajn korpojn, tegitajn de koto kaj parazitoj, kaj ĉion ĉi fari ĉe varmega vetero, meze de sufokigaj, naŭzaj haladzoj, ĝemegoj, doloraj kriegoj!

Tamen grupeto da volontuloj formiĝis. Mi, bone-malbone, organizas la helpadon en kvartalo, kiu ŝajnas plej senzorga kaj mi elektas unu el la Castiglione'aj preĝejoj, Chiesa Maggiore.

Preskaŭ kvin cent soldatoj estas amasigitaj sur pajlaĵo. Ĉirkaŭ cent aliaj suferas kaj ĝemas, kuŝante sur la publika placo, antaŭ la preĝejo.

En la preĝejoj, la lombardaj virinoj iras de unu al alia kun vazoj kaj kruĉoj plenaj de klara akvo, kiu servas por kvietigi la soifon, por malseekigi la vundojn. Kelkaj el tiuj ĵus edukitaj flegistinoj, estas bonkoraj maljunulinoj, aliaj estas ĉarmoplenaj junulinoj; ilia dolĉeco, boneco, kompatemo, iliaj atentemaj zorgoj iom restarigas kuraĝon de la vunditoj.

Tieaj knaboj iras kaj reiras inter la preĝejoj kaj plej najbaraj fontanoj, kun siteloj, kruĉoj aŭ vazoj.

Disdonon de akvo sekvas disdonoj de buljono kaj supo, kiun la Intendantara servistaro devas kuiri je mirindaj kvantoj.

Dikegaj pakegoj da ĉarpio estas metitaj tie ĉi kaj tie. Ĉiu povas preni ĝin sufiĉege; sed bendetoj, tolaĵoj, ĉemizoj mankas, kaj oni malfacile povas trovi la plej nepre necesajn objektojn. Tamen mi aĉetas novajn ĉemizojn, per la pero de tiuj bonkoraj virinoj, kiuj jam donacis sian tutan malnovan tolaĵaron; kaj lunde, frumatene, mi sendas mian veturigiston al Brescia, por ke li realportu provizaĵojn. Li revenas post kelkaj horoj kun kabrioleto ŝarĝita per spongoj, tolaj bendoj, pingloj, cigaroj, tabako, kamomiloj, malvoj, sambukaĵoj, oranĝoj, sukero kaj citronoj.

Tio ebligas doni refreŝigan limonadon, lavi vundojn per malvakvo, surmeti varmetajn kompresojn kaj ŝanĝi la bendojn de bandaĝoj.

Atendante, ni varbis rekrutojn, kiuj helpas al ni. Unue venas maljuna ŝipoficiro; poste anglaj turistoj, kiuj, dezirante vidi ĉion, eniris la preĝejon: ilin ni konservas preskaŭ perforte; du aliaj angloj kontraŭe montras sin tre deziremaj helpi; ili disdonas cigarojn al Aŭstroj. Itala pastro, tri aŭ kvar vojaĝantoj aŭ videmuloj, svisa negocisto el Neuchâtel, pariza ĵurnalisto, kiu poste prenas sur sin la gvidadon de la helpado en apuda preĝejo, kaj kelkaj oficiroj, kies roto ricevis ordonon resti en Castiglione, helpas al ni.

Sed baldaŭ kelkaj el tiuj volontaj flegantoj foriras, ne povante elporti vidon de tiaj suferoj; la pastro imitis ilin, sed li baldaŭ reaperas por flar-

igi al ni, je delikata afablaĵo, bonodorajn herbojn kaj salboteletojn. Turisto, premita de la vidado al tiuj vivantaj pecaĵoj, svenas pro kortuŝiĝo. La Neuchâtel'a negocisto persistas dum du tagoj bandaĝi vundojn kaj skribi por mortiĝantoj adiaŭajn leterojn al iliaj familioj. Oni estas devigata kvietigi la kompatan ekscitiĝon de Belgo; oni timas ke lin kaptos atako de varma febro.

Kelkaj soldatoj el franca garnizono lasita en la urbo, provas helpi al siaj kolegoj, sed ili ne povas elporti vidaĵon, kiu faligas ilian kuraĝon, tro akre frapante ilian imagon. Tamen kaporalo el la genikorpuso, vundita ĉe Magenta, preskaŭ resaniĝinta kaj reironta al sia bataliono, sed al kiu la irletero lasas kelkajn tagojn da libertempo, helpas nin kuraĝe kaj persisteme.

La franca intendanto, restinta en Castiglione, fine, pro mia insistado, permesas, ke oni utiligu por servado en hospitaloj, kelkajn sanajn kaptitojn, kun tri aŭ kvar aŭstraj kuracistoj, kiuj partoprenas klopodojn de la tro malmultaj kirurgoj lasitaj en Castiglione.

Germana kuracisto, propravole restinta sur la batalkampo por bandaĝi vunditojn, dediĉas sin al ambaŭarmeaj trafitoj. Post tri tagoj, la intendanto resendas lin en Mantova al liaj samlandanoj.

« Ne lasu min morti ! » ekkrias kelkaj el tiuj agoniantoj, senesperiĝante kaj kaptante mian manon. Sed la morto ne prokrastiĝas.

« Ha, sinjoro, se vi povus skribi al mia patro, li konsolu mian malfeliĉan patrinon ! », diris al mi kun larmoj en okuloj kaporalo nomita Mazet, apenaŭ dudek-jara. Mi notis adreson de liaj gepatroj, kaj post kelkaj momentoj, li ĉesis vivi. — La gepatroj kiuj loĝis sur la strato d'Alger, 3, en Lyon, kaj kies sola filo estis tiu junulo, propravola dungito, ricevis nenian informon pri sia filo, krom tiuj, kiujn mi sendis al ili : li verŝajne estis, kiel tiom multaj aliaj, enskribata kiel « malaperinta ».

Maljuna serĝento, kelkafoje redungiĝinta, ripetadis al mi kun profunda malgajeco, kun konvinkita mieno plena de maldolĉeco : « Se oni estus fleginta min pli frue, mi estus eble vivinta, dum hodiaŭ vespere mi mortos ! » — Vespere, li mortis.

« Mi ne volas morti ! Mi ne volas morti ! » kriegadis energie, sovaĝe, grenadisto el la gvardio, plena de forto kaj sano antaŭ tri tagoj, sed kiu, mortige trafite, kaj bone sentante, ke liaj minutoj estas nereveneble kalkulitaj, batalas kontraŭ tiu malluma certiĝo. Mi parolas, li aŭskultas ; kaj tiu viro, dolĉigita, kvietigita, konsolita, fine rezigniĝas morti kun simpleco de infano.

En la fundo de la preĝejo, ĉe kavaĵo de altaro, Afrika ĉasoro kuŝas sur pajlaĵo. Tri kugloj trafis lin, unu ĉe la dekstra flanko, unu ĉe la mal-

dekstra ŝultro, tria restis en la dekstra kruro. Estas dimanĉo kaj li certigas, ke li nenion manĝis jam de vendredo. Li estas kovrita de sekiĝinta koto, de sangaj pecetoj; liaj vestoj estas disŝiritaj; lia ĉemizo dispecigita. Post kiam mi lavis liajn vundojn, trinkigis iom da buljono kaj envindis lin en kovrilo, li metas mian manon al siaj lipoj kun nedirebla danka esprimo. — Poste oni povis sendi lin al pli bona ambulanco.

Ĉe la enirejo de la preĝejo estas Hungaro, kiu krias senpaŭze kaj senĉese, alvokante kuraciston kun korŝira tono. Lia dorso, liaj ŝultroj, plugitaj de kuglaraj pecoj, estas kvazaŭ disŝiritaj per feraj hokoj kaj lasas vidi karnon ruĝan kaj moviĝantan. Cetero de lia korpo estas ŝvelinta, verda, nigra, abomena. Li povas nek kuŝiĝi, nek sidiĝi. Mi trempas pakojn da ĉarpio en malvarman akvon kaj provas fari al li kuŝejon, sed la gangreno senprokraste lin forrabos.

Iom malapude kuŝas mortiĝanta zuavo, kiu ploregas: lin oni devas konsoli kvazaŭ infaneton. La angaŭaj laciĝoj, la manko de nutraĵo kaj ripozo, la forttaŭaj laciĝoj, la manko de nutraĵo kaj ripozo, la forteco de l'doloro, la timo morti senhelpe, elvokas, eĉ ĉe bravegaj soldatoj, nervozan sentemecon, kiu montras sin per ploroj. Unu el iliaj ĉefaj pensoj, kiam ili ne tro kruele suferas, estas rememoro al la patrino kaj antaŭtimo al la ĉagreno, kiun ŝi havos, eksciante la sorton de sia filo. Sur kadavro de unu soldato, ni trovis medaljonon pendantan de lia kolo kaj kiu entenis portre-

ton de maljuna virino, verŝajne lia patrino ; per sia maldekstra mano li premis ĝin sur sian koron.

En la parto plej najbara al la pordego de preĝejo Maggiore kuŝas nun sur pajlo, ĉiuj envolvitaj en kovrilo, ĉirkaŭ cent francaj suboficiroj kaj soldatoj. Ili estas ordigitaj laŭ du apudaj paralelaj vicoj, inter kiuj oni povas paŝi. Ili ĉiuj estas bandaĝitaj. La disdono de supo estas farita. Ili estas kvietaj. Ili sekvas min per sia rigardo ; ĉiuj kapoj turniĝas dekstren, kiam mi iras dekstren, maldekstren, se mi iras maldekstren. Sincera dankado estas videbla sur iliaj miraj vizaĝoj. « Oni facile vidas, ke li estas Parizano » diras kelkaj. — « Ne, rebatas aliaj, li ŝajne estas Sudano ». — « Ĉu ne vere, Sinjoro, vi estas el Bordeaux ? » demandas min alia : ĉiu volas ke mi estu el lia urbo aŭ provinco. — Poste, mi renkontis kelkajn el tiuj vunditoj, kiuj fariĝis amputitaj kripluloj. Ili haltigis min por esprimi sian dankadon, ke mi flegis ilin en Castiglione. « Ni nomis vin « *La blanka Sinjoro* », diris unu per pitoreska lingvaĵo, « ĉar vi ĉiam havis tute blankan veston : estas vere, ke la vetero estis ne malvarma ! »

La rezigneco de tiuj kompatintaj soldatoj estis ofte kortuŝanta ; ili suferadis senplende, ili mortis humile kaj senbrue.

Sur l'alia flanko de la preĝejo, kelkaj vunditaj aŭstraj kaptitoj timas ricevi flegojn, kiujn ili malkonfidas. Ili kolere forŝiras siajn bandaĝojn kaj sangigas siajn vundojn. Aliaj restadas silentaj, seninteresiĝantaj, senesprimaj. Sed la plej multo tute ne estas ne impresebla

de la bonfarado kaj ilia vizaĝo esprimas ilian dankadon. Unu el ili, ĉirkaŭ deknaŭ-jara, kiu kun kvardeko da samlandanoj estas puŝita en la plej funda parto de la preĝejo, dum du tagoj restis sennutre. Li perdis unu okulon, li tremas febre ; apenaŭ li kapablas paroli kaj trinki iom da buljono. Niaj flegoj revivigas lin ; dudek kvar horojn poste, kiam oni povis lin sendi al Brescia, kun bedaŭro li forlasis nin, preskaŭ malespere, premante sur siajn lipojn la manojn de la Castiglione'aj bonkorulinoj, kiujn li petegas ne lin forlasi.

Alia kaptito, atakata de febrego, tiras la rigardojn sur sin ; li ne estas ankoraŭ dudek-jara kaj liaj haroj estas jam tute blankaj ; ili blankiĝis dum la batalo, certigas liaj kamaradoj apud li vunditaj.

La Castiglione'aj virinoj, vidante, ke mi tute ne atentas la naciecon, imitas mian ekzemplon, montrante egalan afablecon por ĉiuj tiuj homoj el tiel diversaj devenoj kaj kiuj estas al ili ĉiuj same fremdaj. « *Tutti fratelli* », ripetas ili kompate, « Ĉiuj fratoj ! ».

Honcru al tiuj kompatemaj virinoj, al tiuj junulinoj Castiglione'aj ! Tiom sindonemaj kiom modestaj, ili atentis nek laciĝon, nek naŭzojn, nek oferon ; nenio forigis, lacigis aŭ senkuraĝigis ilin.

Por soldato rekomencinta ĉiutagan vivadon de militiranta armeo, post kortuŝiĝo kaj laciĝo de tia batalo la rememoroj al la familio fariĝas plej fortaj. Tiu spirita stato estas brile pentrita per la jenaj linioj de oficiro skribanta el Volta al sia frato restinta en Francujo :

« Vi ne povas imagi, kiom la soldatoj kortuŝiĝas,

kiam ili ekvidas la leteriston, kiu disdonas la leterojn al la soldataro ; li ja portas al ni, komprenu, sciigojn el Francujo, naskolando, gepatroj, amikoj ! Ĉiu aŭskultas, rigardas kaj etendas al li kaptemajn manojn. La feliĉuloj, — tiuj, kiuj ricevas leteron — rapidege malfermas ĝin kaj tuj tralegas ĝin ; la ceteraj, la kompatinduloj, foriras malĝoje kaj izoliĝas por pensadi pri tiuj, kiuj restis tie, malproksime.

« Iafoje oni vokas nomon, kiun neniu respondas. Oni rigardas, interdemandas sin, oni atendas. — « Mortinta ! » murmuris ies voĉo ; kaj la leteristo enpakas tiun leteron, kiu reiros, nemalfermite, al la skribintoj. Ili tiam ĝojis, tiuj ĉi, ili pensis : « li estos kontenta, ricevante ĝin » ! Kaj kiam ili vidos ĝin revenantan, ilia kompatinda koro rompiĝos ».

La Castiglione'aj stratoj estas pli trankvilaj. La mortoj kaj foriroj lasis lokon.

Spite la alveno de novaj ĉaroj da vunditoj, la ordo iom post iom fariĝas, kaj la deĵoroj ekreguliĝas.

La sendoj el Castiglione al Brescia fariĝas pli ofte. Ili konsistas precipe el ambulancaj veturiloj kaj maldelikataj ĉaregoj, kiuj, senĉese alportantaj al la franca tendaro pafprovizaĵojn kaj ĉiaspecajn objektojn, reiras senŝarĝe al Brescia.

Ili estas trenataj de bovoj, kiuj tre malrapide paŝas sub fajra suno kaj en polvo tiel dika, ke piediranto enŝoviĝas en ĝi supermaleolen. Tiuj maloportunaj veturiloj estas kovritaj per arbobranĉoj, kiuj tre malperfekte

ŝirmas kontraŭ pikado de brula suno la vunditojn amasigitajn, tiel diri, unu super alia. Nur malfacile oni povas imagi la turmentadon de tiu longa vojirado !

En tiuj veturiloj unuj ĝemas, aliaj elvokas sian patrinon ; ĉe aliaj aŭdiĝas revaĵoj kaj deliriaĵoj de l'febro, kelkafoje malbenoj kaj blasfemoj.

Plej malgrava signo de atento farita al tiuj malfeliĉuloj, afabla saluto, ŝajnas ilin kontentigi ; tuj ili redonas ĝin kun dankesprimo.

En ĉiuj domaroj starantaj apud la vojo kondukanta al Brescia, vilaĝaninoj, sidante antaŭ sia pordo, silente pretigas ĉarpion. La komunumaj estraroj prepa rigis trinkaĵojn, panon, nutraĵojn. Kiam alvenas vunditaro, la vilaĝaninoj suriras veturilojn, lavas vundojn, ŝanĝas ĉarpion kaj kompresojn, kiujn ili surverŝas per freŝa akvo. Ili verŝas kulerojn da buljono, vino aŭ limonado en buŝon de tiuj, kiuj ne havas jam forton levi la kapon aŭ etendi brakon.

En Montechiaro tri malgrandaj hospitaloj estas servataj de popolaninoj, kiuj flegas tiel sagace, kiel bonkore. En Guidizzolo, ĉirkaŭ mil kripluloj estas aranĝitaj en vasta kastelo. En Volta, malnova monaĥejo kazernigita, ricevas kelkajn centojn da Aŭstroj. En Cavriana oni ordigis en la preĝejo grandan kvanton da Hungaroj, kiuj restis dum kvardek ok horoj sen ia helpo. En la ambulanco de la granda ĝenerala kvartalo, oni operacias, uzante kloroformon, kiu elvokas ĉe la Aŭstroj preskaŭ tujan sensentecon kaj ĉe la Francoj

nervajn kuntiriĝojn kaj ekscitegecon antaŭ ol produkti la senkonscion.

La Cavriana'anoj estas tute senigitaj je nutraĵo kaj provizaĵoj ; la soldatoj de la gvardiaro nutras ilin, dividante siajn porciojn kaj sian supon : la kamparoj estas ruinegitaj, kaj preskaŭ ĉio manĝebla, brutaro kaj terproduktaĵoj, estas vendita al la aŭstraj soldatoj. La franca armeo havas multan irnutraĵon, sed nur tre malfacile ĝi povas trovi la buteron, grasaĵon, legomojn necesajn por la ordinara nutrado de la militistoj.

La vunditoj de la Sardinia militistaro, kiuj estas portitaj en Desenzano, Rivoltella, Lonato, Pozzolengo, estas tie en malpli malbona situacio ol la Francoj kaj Aŭstroj provizore metitaj en Castiglione. Ĉar Desenzano kaj Rivoltella ne estas okupitaj en kelkaj tagoj de du diversaj armeoj, oni ankoraŭ trovas tie nutraĵon ; la ambulancoj estas pli en ordo, kaj la loĝantoj, malpli konfuzitaj, ageme helpas la vundul-flegadon. La malsanuloj estas sendataj al Brescia per bonaj ĉaretoj provizitaj per dika tavolo da fojno ; ili estas ŝirmataj kontraŭ la suno per arkaĵoj da foliaĵo interplektita kun fortika tolaĵo supre.

La sento, kiun oni havas pri sia propra malsufiĉeco en tiel eksterordinaraj cirkonstancoj, kaŭzas neesprimeblan suferon. Ekstreme ĉagrena estas la sento, ke oni ne povas helpi al ĉiuj, kiuj kuŝas antaŭ vi, ĉar ili estas tro multegaj ; nek atingi tiujn, kiuj krias al vi petege. Longaj horoj forpasiĝas ĝis oni venas la plej kompatindajn, ĉar oni estas haltigata de unu, petegata de alia,

ĉiuj egale kompatindaj, ĉiupaŝe embarasata de multego da mizeruloj, kiuj ĉirkaŭas vin, kiuj petas subtenon kaj helpon. Kaj kial turni sin maldekstren dum dekstre kuŝas tiel multaj homoj kiuj baldaŭ mortos sen helpa vorto, sen konsola parolo, eĉ sen unu sola glaso da akvo por kvietigi sian brulan soifon ? La penso pri graveco de unu vivo homa, kiun oni povus eble savi ; la deziro malpliigi la turmentiĝon de tiom multaj kompatinduloj kaj restarigi ilian kuraĝon ; la deviga, senĉesa aktiveco, kiun oni trudas al si mem dum tiaj momentoj, elvokas ekstreman energion, kvazaŭ soifon helpi al kiel eble dlej multaj homoj. Oni ne kortuŝiĝas plu ĉe mil scenoj piversaj de tiu terurega tragedio, oni indiferente paŝas antaŭ kadavroj plej abomene senformigitaj ; oni rigardas preskaŭ malvarme, kvankam plumo rifuzas ilin priskribi, vidaĵojn ankoraŭ pli abomenajn ol tiuj tie ĉi raportitaj ; sed okazas iafoje, ke la koro subite rompiĝas, neatendite kaptita de premega malĝojo pro simpla okazeto, izola fakto, neatendita detalo, kiu pli rekte trafas la animon, tiras nian simpation, movas la plej impreseblajn kordojn de nia estaĵo kaj resumas la tutan abomenaĵon de tiu dramo.

Lacega, jam ne kapabla dormi, posttagmeze de lundo 27-a, mi jungigis mian kabrioleton kaj foriris ĉirkaŭ la sesa horo por liber-aere spiri la freŝaĵon de l'vespero kaj trovi iom da ripozo, momente forkurante for de la funebregaj vidaĵoj, kiuj ĉirkaŭas min ĉiuflanke en Castiglione.

Favora estis la tago, ĉar nenia soldata moviĝo estis komandita dum ĝi.

Kvieto venis post la terura agitado de l'antaŭaj tagoj. Tie ĉi kaj tie estas videblaj marĉetoj da sekiĝinta sango, kiu ruĝigas la batalkampon. Oni renkontas teraĵon nove movitan, blankigitan, superŝutitan per kalko ; tie ripozas viktimoj de l'24-a de junio.

En Solferino, kies kvarangula turo fiere superas jam de kelkaj jarcentoj tiun landon, kie, por la tria fojo, ĵus renkontiĝis du el la plej grandaj Potencoj en la moderna tempo, oni ankoraŭ relevas multajn rompaĵojn, kiuj kovras ĝis en la tombejo la krucojn kaj sangigitajn ŝtonojn de la tomboj. La tero estas superŝutita per glavoj, pafiloj, sakoj, kartoĉujoj, ladvazoj, ĉakoj, kaskoj, zonumoj. Preskaŭ ĉio estas tordita, disŝirita, rompita.

Mi alvenas en Cavriana ĉirkaŭ je la naŭa vespere.

Impona vidaĵo estas la militaĵaro ĉirkaŭanta la ĉefan kvartalon de la imperiestro de Francoj.

Mi serĉas marŝalon dukon de Magenta, kiun mi persone konas.

Ĉar mi ne scias ĝuste, kie sidas lia korpuso, mi haltigas mian kabrioleton sur placeto, antaŭ domo, kie loĝas jam de vendredo vespere imperiestro Napoléon. Mi ekvenas en la mezon de amaso da generaloj, sidantaj sur pajlumitaj seĝoj kaj lignaj skabeloj ; ili fumas cigarojn kaj spiras la freŝan aeron antaŭ la ĵus aranĝita palaco de la regnestro.

Dum mi informiĝas pri la direkto al marŝalo Mac-

Mahon, kelkaj generaloj, tre scivoligitaj de mia veno, demandas la kaporalon vunditan apud Magenta, kiu petis permeson akompani min je tiu ekskurso tra la militistaroj, ĉar lia rango povas anstataŭi por mi irleteron. Sidante apud la veturigisto, li donas al mi kvazaŭ oficialan karakteron. La generaloj deziras sciiĝi, kiu mi estas kaj malkovri la celon de la misio, kiun mi havas laŭ ilia opinio, ĉar ili ne povas imagi, ke simpla turisto kuraĝis riskiĝi sola en mezon de militistaro en tia momento.

La kaporalo, kiu scias nenion, restas nepenetrebla, kvankam li respekteme respondas iliajn demandojn. Tial la scivoleco tre pligrandiĝas, kiam oni vidas, ke mi foriras al Borghetto, kie estas duko de Magenta.

La dua korpuso, komandata de la marŝalo, transpaŝis de Cavriana al Castellaro, kiu sidas je kvin kilometroj pli malproksime ; ĝiaj divizioj aranĝis sin dekstre kaj maldekstre de la vojo kondukanta de Castellaro al Monzambano. La marŝalo mem, kun sia stabo, loĝas en Borghetto.

Spite la nokto ĵus fariĝinta, ni daŭrigas nian vojiradon. La fajroj de la bivakoj, nutrataj per tutaj arboj ; la lumaj tendoj de la oficiroj, prezentas pitoreskan rigardaĵon. La lastaj bruetoj de tendaro ekdormanta kaj observanta ripozas iom mian ekscitegitan imagon. Sub tiu bela stelplena ĉielo, solena silento fine anstataŭas la bruojn kaj la kortuŝojn de la ĵusaj tagoj. Mi ĝuege spiras la puran kaj dolĉan aeron de belega itala nokto.

Ĉar ni povis ricevi nur neplenajn informojn, ni vojeraras, paŝante sur vojon kondukantan al Volta. Ni okaze renkontas la korpuson de generalo Niel farita marŝalo antaŭ tri tagoj kaj haltinta en la ĉirkaŭaĵo de tiu ĉi urbeto.

Mia itala veturigisto estas tiel timigata de la ideo, ke li estas tute apud la aŭstraj linioj, ke pli ol unu fojon mi devis depreni de li la kondukilojn kaj ilin doni al la kaporalo sidanta apud li sur la benketo. La malfeliĉa homo estis forkurinta el Mantua kelkajn tagojn antaŭe por savi sin el la aŭstra servado ; rifuĝinta en Brescia li dungiĝis ĉe veturilluisto. Lia timo pligrandiĝas, ĉe aŭdo de pafo de malproksime pafita de iu, kiu malaperas en densaĵojn. — Dum la malantaŭen irado de l'aŭstra armeo, multe da forkurantaj soldatoj kaŝis sin en keloj de domoj vilaĝetaj, forlasitaj de la loĝantoj kaj duone renversitaj. Por ne esti kaptataj, ili unue trinkis kaj manĝis bone-malbone en tiuj subteraĵoj ; poste, elĉerpinte la provizaĵojn kaj puŝate de la malsato, sed bone armitaj, ili vagadis okaze dum la nokto.

La malfeliĉa Mantuano, teruriĝita, ne povas plu rekte gvidi sian ĉevalon ; li senĉese turnas la kapon, per senprudenta rigardo esploras ĉiujn apudvojajn densaĵojn, plektaĵojn, kajutojn, timante ĉiuminute, ke elsaltu ia embuskita Aŭstro. Lia timo pligrandiĝas ĉe ĉiu fleksiĝo de la vojo kaj li preskaŭ svenas, kiam en la silento de la nokto, ni estas surprizataj de pafo de gardisto, kiun ni ne vidis pro la mallumo. Lia teruro fariĝas nedirebla, kiam ni preskaŭ frapiĝas kontraŭ granda

pluvombrelo larĝe malfermita, kiun mi konfuze ekvidas apud la vojo, ĉe paŝejo kondukanta al Volta. Tiu mizera ombrelo, traborita de kugloj kaj kuglegoj, kredeble estis parto de la pakaĵaro de ia kantinistino, kiu perdis ĝin dum la fulmotondro de la 24-a de junio.

Ni estis returnen venintaj por atingi la vojon al Borghetto. Jam forpasis la dek-unua horo. Ni galopigis la ĉevalon kaj nia modesta veturileto, trarulanta la spacon, preskaŭ senbrue kuris sur la strato *Cavallara,* kiam krioj « Kiu ? Kiu ? Kiu ? Mi tuj pafos ! » kvazaŭ sagoj elfluas el buŝo de nevidebla gardostaranto.

« Franco ! » respondas tuj laŭta voĉo, kiu kromdiras, prezentante sian rangon : « Kaporalo en la unua genio, sepa roto ».

« Iru for » estas respondata.

Sen tiu spirita regeco de la kaporalo, ni estus ricevintaj pafon preskaŭ en la vizaĝon.

Fine, kvaronhoron antaŭ la dekdua, ni atingas, sen nova renkonto, la unuajn domojn de Borghetto.

Ĉio estas malluma kaj silenta. Tamen lumo brilas ĉe teretaĝo de domo en la ĉefa strato. Tie laboras en malalta ĉambro administraciaj oficiroj. Kvankam ĝenate en sia laboro kaj tre mirigite de nia apero en tia horo, ili kondutas tute afablege. Pagista oficiro, S-ro Outrey, proponas al mi koran gastadon. Lia servosoldato alportas matracon, sur kiun mi lasas min fali tute vestite, por ripozi dum kelkaj horoj ; antaŭe tamen mi trinkis bonegan buljonon, kiu ŝajnis al mi des pli bongusta, ke mi estis malsata kaj de kelkaj tagoj estis man-

ĝinta nenion eĉ mezbonan. Mi povis dormi trankvile, ne estante, kiel en Castiglione, sufokata de naŭzaj haladzoj kaj turmentata de muŝoj, kiuj satiĝinte je kadavroj, atakis ankaŭ la vivantojn.

La kaporalo kaj la veturigisto simple aranĝis sin en la kabrioleto restinta sur la strato ; sed la kompatinda Mantuano, ĉiam en terurado, ne povis fermi okulojn dum la tuta nokto, kaj la morgaŭan tagon li estis pli mortinta ol vivanta.

Mardon 28-an, je la sesa matene, mi estis akceptata plej afeblege de marŝalo Mac-Mahon.

Je la deka horo mi denove estis en Cavriana. Baldaŭ poste mi eniris la modestan domon, estonte historian, kie ankoraŭ loĝis imperiestro Napoléon.

Je la tria posttagmeze mi denove troviĝis meze de la Castiglione'aj vunditoj, kiuj esprimis sian ĝojon revidi min.

La 30-an de junio mi estis en Brescia.

Tiu ĉi urbo, tiel ĉarma kaj pitoreska, estas ŝanĝita, ne en granda provizora ambulanco kiel Castiglione, sed en vastega hospitalo. Ĝiaj du katedraj preĝejoj, ĝiaj palacoj, preĝejoj, monaĥejoj, gimnazioj, kazernoj, unuvorte ĉiuj ĝiaj monumentoj ricevas viktimojn el Solferino. Dekvin mil litoj estas, tiel diri, minute konstruitaj de unu tago ĝis sekvanta. La loĝantoj faris pli ol oni iam faris ĉe similaj cirkonstancoj.

En la centro de la urbo, la malnova ĉefpreĝejo *il Duomo vecchio,* entenas ĉirkaŭ mil vunditojn. La popolo venas amase al ili ; ĉiaklasaj virinoj alportas

multege oranĝojn, gelatojn, biskvitojn, bonbonojn, frandaĵojn. Plej humila vidvino aŭ plej malriĉa maljunulino opinias, ke ŝi devas prezenti sian simpatian signaĵon aŭ modestan oferaĵon.

Similaj scenoj okazas en la nova katedra preĝejo, belega templo el blanka marmoro, kie estas kolektitaj centoj da vunditoj. Same estas en kvardek aliaj konstruaĵoj, preĝejoj aŭ hospitaloj, kiuj entenas preskaŭ dudek mil vunditojn.

La urbestraro de Brescia komprenis la eksterordinaran devon al ĝi trudatan de tiel gravaj cirkonstancoj. Stariginte sin en senpaŭza kunsidado, ĝi helpis sin per konsiloj de la urbaj kompetentuloj, kiuj serveme partoprenis ĝian laboradon.

Malfermigante jen monaĥejon, jen preĝejon, la urbestraro en malmultaj horoj kreis kvazaŭ sorĉe hospitalojn kun centoj da litoj, vastaj kuirejoj, tolaĵprovizitaj lavejoj, kun ĉio okaze necesa.

Tiuj faroj estis plenumitaj tiel bonkore, ke post malmulte da tagoj oni povis admiri la ordecon kaj regulan funkciadon de tiuj ĵus aranĝitaj hospitaloj. La loĝantaro en Brescia, kiu estis kvardek-mil-homa, preskaŭ subite duobliĝis pro la amaso da vunditoj kaj malsanuloj. La kuracistoj, kiuj estis cent kvardek, montris grandan sindonemon dum la tuta daŭrado de sia laciga servado. Ili estis helpataj de medicinaj studentoj kaj de kelkaj volontaj homoj. Helpaj komitatoj organiziĝis; speciala komisio estis elektata por ricevi ĉiaspecajn donacojn litaĵajn, tolaĵajn, diversprovizaĵajn;

alia komisio administris la tenejon aŭ centran magazenon.

En la vastaj haloj de la hospitaloj, la oficiroj estas ordinare apartigitaj de la soldatoj. La Aŭstroj ne estas miksitaj kun la Liganoj. La serioj da litoj estas ĉiuj similaj : sur bretaro, super lito de ĉiu soldato, lia uniformo kaj lia kepo ebligas scii lian soldatspecon.

Oni komencas malpermesi la eniron al la popolo, ĉar ĝi embarasas kaj malhelpas la flegadon.

Apud soldatoj kun rezignaj vizaĝoj, kuŝas aliaj, kiuj murmuras. La ideo pri amputiĝo ne multe teruriĝas la francajn soldatojn pro ilia senzorgema naturo, sed ili estas senpaciencaj, incitiĝemaj. La Aŭstroj, malpli facilhumoraj, estas pli inklinaj malgajiĝi en sia izoleco.

En tiuj hospitalaj ĉambroj mi retrovas kelkajn el niaj Castiglione'aj vunditoj. Ili nun estas pli bone zorgataj, sed ilia turmentado ne finiĝis.

Jen unu el la heroaj voltiĝeroj de la imperiestra gvardio ; li estas vundita apud Solferino. Trafita de pafaĵo en unu kruron, li pasigis kelkajn tagojn en Castiglione, kie la unua mi bandaĝis lin. Li estas sternita sur pajlomatraco ; la esprimo de la vizaĝo montras profundan suferadon ; liaj okuloj estas kavaj kaj brilaj ; lia palega mieno vidigas, ke la pusa febro komplikis kaj pligravigis lian farton ; liaj lipoj estas sekaj ; lia voĉo tremas ; la sentimeco de la bravulo lasis lokon por antaŭtimo, timema ŝanceliĝo ; la zorgoj mem incitas lin ;

li timas, ke oni alproksimiĝu al lia malfeliĉa kruro malsana, jam atakita de gangreno.

Franca kirurgo, kiu faras la amputojn, preteriras lian liton ; la malsanulo kaptas lian manon kaj premas ĝin en la siaj, kies tuŝo similas tiun de brula fero.

« Ne doloru min ! Terura estas mia sufero ! » li krias.

Sed oni devas agadi, kaj senprokraste. Dudek aliaj vunditoj devas esti operataj dum la sama mateno kaj cent kvindek atendas bandaĝadon. Oni ne havas tempon kompati al unu sola homo nek atendi la finon de lia ŝanceliĝo. La kirurgo, malvarmsenta kaj decidema, respondas : « Lasu min agi ». Post li rapide levas la kovrilon. La rompita kruro duoble ŝvelis ; el tri lokoj elfluas multa kaj malbonodora pusaĵo ; violkoloraj makuloj pruvas, ke ĉar arterio rompiĝis, la sola rimedo, se unu ekzistas, estas la fortranĉo.

Fortranĉo ! Teruriga vorto por tiu kompatinda junulo, kiu jam havas antaŭ siaj okuloj nur elekton inter baldaŭa morto aŭ mizera vivado de kriplulo.

Li jam ne havas tempon pretigi sin por la lasta decidiĝo, kaj tute tremante pro premtimo, li ekkrias malespere : « Ho ! Kion vi faros ? » La kirurgo ne respondas. — « Flegisto, transportu, rapide ! » li diras. Sed korŝira krio ellaŭtiĝas el tiu batiĝanta brusto : la mallerta fleganto kaptis la kruron senmovan kaj tamen tiel doloran multe tro proksime al la vundo : la rompitaj ostoj, enŝoviĝante en la karnon, kaŭzis novan turmen-

tadon al la soldato, kies kruro fleksiĝas, balancate de la skuoj de l'transportado ĝis la operacia ĉambro.

Abomena irantaro ! Ŝajnas, ke oni kondukas viktimon al buĉo.

Li fine kuŝas sur la operacia tablo. Apude, sur alia tablo, tuko kaŝas la instrumentojn. La kirurgo, tute okupata de sia afero, aŭdas kaj vidas nur sian operacion. Juna militkuracisto tenas la brakojn de la paciento dum la flegisto, kaptinte la sanan kruron, tiras la malsanulon al la rando de la tablo. Tiu ĉi, timigita, ekkrias : « Ne lasu min fali ! » kaj li konvulsie premas en siaj brakoj la junan kuraciston, kiu subtenas lin kaj, pala pro kortuŝeco, estas mem preskaŭ egale konfuzita.

La operanto, metinte unu genuon sur la ĉambrajn kahelojn kaj preninte en la manon la teruriganta tranĉilon, ĉirkaŭŝovas sian brakon ĉirkaŭ la gangrenitan membron de la soldato kaj fendas la haŭton tute ĉirkaŭe. Ŝira krio sonas en la hospitalo. La juna kuracisto, vizaĝo ĉe vizaĝo kun la turmentato, povas rigardadi sur liaj kuntiriĝintaj trajtoj la plej malgrandajn detalojn de tiu abomena agonio.

« Kuraĝu », li diras mallaŭte al la soldato, kies manoj kroĉiĝas sur lian dorson, « ankoraŭ du minutojn kaj vi estos liberigita » !

La kirurgo restariĝis. Li disigas la haŭton de la subaj muskoloj, kiujn li malkovras ; li distranĉas la karnon, returnen tirante la haŭton ; poste, rekomencante, per forta ĉirkaŭbato, li distranĉas ĉiujn muskolojn ĝis la osto. Torento da sango elŝprucas el la arterioj ĵus

malfermitaj, distegas la operanton kaj fluegas sur la plankon.

Kun vizaĝo malvarma kaj senesprima, la sperta operaciisto ne elparolas eĉ unu vorton ; sed subite, meze de la silento reganta en la ĉambro, li kolere turnas sin al la mallerta flegisto kaj riproĉas, ke li ne scias surpremi la arteriojn. Tiu ĉi lasta, ne sperta, ne sciis antaŭaverti la hemoragion, metante konvene sian dikan fingron sur la sangovazojn.

La vundito, ĉe la plej alta grado de la sufero, malforte eldiras : « Ho, sufiĉe ! Lasu min morti ! » kaj malvarma ŝvito fluas sur lian vizaĝon.

Sed li devas ankoraŭ elporti unu minuton, unu minuton, kiu ŝajnas eternaĵo.

La juna kuracisto, ĉiam simpatiema, kalkulas la sekundojn kaj rigardas jen la operantan kirurgon, jen la pacienton, kies kuraĝon li provas subteni, kaj li diras : « Nur unu minuton ».

La momento de la segado ja alvenis ; jam oni aŭdas la grincadon de la ŝtalo penetranta en la vivoston kaj disiganta de la korpo la membron duone gangrenitan.

Sed la doloro estis tro forta por tiu malforta, elĉerpita korpo. La ĝemoj ĉesis, ĉar la malsanulo svenis. La kirurgo, kiu ne estas plu gvidata de liaj krioj kaj ĝemoj, timas ke lia silento estas kaŭzita de la morto kaj rigardas lin maltrankvile por certiĝi ĉu li vivas ankoraŭ.

La pretigitaj refortigaĵoj nur malfacile sukcesas re-

vivigi liajn malbrilajn duonfermiĝintajn kaj kvazaŭ velkintajn okulojn. La mortanto tamen ŝajnas ekrevivi : li estas lacega kaj elĉerpita, sed almenaŭ liaj plej grandaj suferoj ĉesis.

Nun prezentu al vi tian operacion ĉe Aŭstro komprenanta nek italan lingvon nek francan kaj lasanta konduki sin kvazaŭ ŝafo al buĉo, ne povante interŝanĝi unu vorton kun siaj bonfaremaj turmentistoj ! La Francoj renkontas ĉie simpation ; ili estas flatataj, dorlotataj, kuraĝigataj ; kiam oni parolas al ili pri la Solferina batalo, ili vigliĝas, disputas : tiu rememoro, glorplena por ili, tirante iliajn pensojn al alia objekto ol ilia propra sorto, iom malpligrandigas ilian malfeliĉon. Sed la Aŭstroj ne ĝuas tiujn privilegiojn. En la hospitaloj, kie oni amasigis ilin, mi insiste petas permeson ilin viziti, mi preskaŭ perforte eniras iliajn ĉambrojn. Kiel danke tiuj bonaj homoj akceptis miajn konsolvortojn kaj la donacon de iom da tabako ! Sur iliajn rezignajn vizaĝojn aperas varma dankado, kiun ili ne scias esprimi laŭ sia deziro. Iliaj rigardoj komprenigas pli multe ol ĉiuj ajn dankoj.

Kelkaj el ili posedas du aŭ tri paperflorenojn, por ili veran riĉaĵeton ; sed ili ne povas ŝanĝi tiun malgravan valoraĵon kontraŭ metalmono !

La oficiroj precipe montriĝas kortuŝiĝemaj pro la zorgoj. En la hospitalo kie li loĝas, princo von Isenburg okupas kun alia germana princo sufiĉe komfortan ĉambreton.

Dum kelkaj sinsekvaj tagoj mi disdonacas, ne atente la naciecon, tabakon, pipojn, cigarojn, en la preĝejoj kaj hospitaloj, kie la tabaka odoro iom malpliigas la naŭzigajn haladzojn devenantajn de l'amasiĝo de tiom multaj homoj en sufokigaj lokoj. Krom tio, ĝi estas distraĵo, forpelilo por la antaŭtimoj de la vunditoj antaŭ la amputiĝo de unu membro ; ne malmultaj estas operitaj kun pipo en buĉo kaj kelkaj mortis, fumante.

Fine, la tuta tabaka provizaĵo en Brescia elĉerpiĝis. Oni devis venigi novan el Milano.

Eminenta loĝanto en Brescia, S-ro Carlo Borghetti, kondukas min per sia veturilo, de hospitalo al hospitalo. Li helpas min en la disdonado de miaj modestaj donacoj tabakaj, aranĝitaj de la vendistoj en miloj da paperkornetoj portataj en grandegaj korboj kaj vastegaj enteniloj, de volontaj soldatoj.

En ĉiuj lokoj mi estas bone akceptata. Sola, lombarda doktoro nomita Callini, ne konsentas permesi la disdonon de cigaroj en hospitalo San Luca al li konfidita. En ceteraj lokoj, kontraŭe, la kuracistoj montras sin preskaŭ egale dankemaj, kiel iliaj kuracatoj. Sed, volante prosperi ankaŭ en San Luca, mi denove vizitas tiun hospitalon kaj sukcesas fari larĝan disdonadon de cigaroj, pro kiuj tre ĝojas la kompatindaj vunditoj, kiuj tute kontraŭ mia intenco suferis Tantalan turmenton.

Dum mia trairado, mi eniras serion da ĉambroj formantaj la duan etaĝon de vasta monaĥejo, kvazaŭ labirinto, kies tera kaj unua etaĝoj estas

plenaj de malsanuloj. Mi trovas en unu el tiuj altaj ĉambroj kvar aŭ kvin vunditojn kaj februlojn, en alia dek aŭ dek-kvin, en tria ĉirkaŭ dudek homojn, ĉiujn forgesitajn (kio estas tre komprenebla, tiom multaj estis vunditoj kaj en tiom diversaj lokoj). Ili maldolĉe plendas, ke ili ne vidis eĉ unu flegiston jam de kelkaj horoj kaj insiste petas, ke oni alportu al ili buljonon anstataŭ la malvarman akvon, kiu estas ilia sola trinkaĵo. Ĉe la fino de longega koridoro, en aparta ĉambreto, mortiĝas, tute sola, senmove sur matraco, juna bersagliero kaptita de tetano. Kvankam li ŝajnas vivoplena kaj havas larĝe malfermitajn okulojn, li aŭdas, komprenas jam nenion kaj restas forlasita.

Multe da soldatoj petas, ke mi skribu al iliaj parencoj, kelkaj al ilia kapitano, kiu anstataŭas por ili la malproksiman familion.

En hospitalo Sankta Klemento, sinjorino el Brescia, grafino Bronna, kun admirinda memforgeso okupas sin je la flegado de amputitoj. La francaj soldatoj parolas pri ŝi entuziasme. La plej mallogaj detaloj ne haltigas ŝin. « *Sono madre!* » diras ŝi simple : « Mi estas patrino ! ». Tiuj vortoj bone esprimas ŝian sindonemon tiel plenan, kiel patrinecan.

En hospitalo San Gaetano, franciska monaĥo, frato Luigi, distingiĝas per sia fervoro kaj boneco por la malsanuloj. Resaniĝanta Piemontano, parolanta france kaj itale, tradukas la petojn de la

francaj soldatoj al la lombardaj kuracistoj : oni konservas lin, kiel tradukiston.

En apuda hospitalo oni uzas kloroformon ; kelkaj pacientoj estas nur tre malfacile kloroformizeblaj ; malfeliĉaĵoj okazas kaj kelkafoje oni vane provas revivigi homon, kiu antaŭ kelkaj minutoj ankoraŭ parolis.

Sur la stratoj mi estis pli ol unu fojon haltigata de bonaj burĝoj, kiuj petegas, ke mi traduku la dezirojn de francaj vunditaj oficiroj, loĝantaj en iliaj domoj, sed kies lingvon ili ne komprenas. La malsanuloj, ekscititaj, malkvietaj, incitiĝas ĉar ili ne estas komprenataj, tute malĝojigante la zorgantojn, kies plej koraj afablaĵoj estas akceptataj kun la malbona humoro ofte elvokata de febro kaj sufero. Unu el ili, el kiu itala kuracisto deziras tiri sangon, kredas, ke oni volas fortranĉi lian brakon, kontraŭbatalas per ĉiuj fortoj, varmiĝas kaj faras al si teruran malbonon. Kelkaj klarigaj vortoj, elparolitaj en ilia gepatra lingvo, solaj prosperas forigi tiujn bedaŭrindajn malkomprenojn kaj kvietigi, trankviligi tiujn kriplulojn el Solferino.

Kiom pacience loĝantoj en Brescia oferas sin por tiuj, kiuj mem oferiĝis por ilin liberigi el fremda regado ! Veran funebron ili sentas, kiam ilia flegato mortas : tiuj kvazaŭ familioj respekte sekvas ĝis la *Campo Santo*, ĝis la lasta ripozejo, la ĉerkon de franca oficiro, ilia kelktaga gasto,

kiun ili ploras kvazaŭ amikon, parencon, filon, sed kies nomon ili eble ne scias !

Dum la nokto oni enterigas la soldatojn mortintajn en la hospitaloj. Oni notas iliajn nomojn kaj numerojn, kion oni preskaŭ neniel faris en Castiglione : tiel ekzemple la gepatroj de kaporalo Mazuet, de mi flegita en *Chiesa Maggiore*, neniam povis ricevi pri sia filo aliajn informojn ol tiujn, kiujn mi sendis al ili.

Ĉiuj lombardaj urboj metis sian honoron en la postulado, ke oni disdonu proporcie la vunditojn.

En Bergamo kaj Cremona, specialaj komisioj, improvize organizitaj, estas helpataj de kromkomitatoj de sindonemaj sinjorinoj. En unu el la Cremona'aj hospitaloj itala kuracisto diris : « Ni konservas la bonaĵojn por niaj amikoj el la Ligarmeo, sed ni donas al niaj malamikoj nur la nepre necesajn objektojn, ĉar se ili mortas, estas negrave ! » Sinjorino, direktanta unu el la tieaj malsanulejoj tuj malaprobis tiujn barbarajn vortojn, dirante ke ŝi ĉiam egale flegados la Aŭstrojn, Francojn kaj Sardiniojn, apartigante nek amikojn nek malamikojn, ĉar, ŝi diris « Nia Sinjoro Jesu-Kristo ne starigis similajn klasojn ĉe la homoj por ilin bonfaradi ».

En Cremona, kiel ĉie aliloke, la francaj kuracistoj bedaŭras sian nesufiĉan nombron. « Mi ne povas, sen granda remalĝojiĝo, diras Doktoro

Sourier, rememori pri malgranda ĉambro da dudek-kvin litoj difinitaj en Cremona por plej danĝere vunditaj Aŭstroj. Tiam mi revidas tiujn vizaĝojn kavajn, flavajn, velkigitajn de elĉerpeco kaj de longa pusa resorbado, petegantajn kun korširanta gestado kaj plendegaj krioj, ke oni faru al ili lastan favoron kaj fortranĉu membron, kiun oni provis konservi sen alia rezultato ol elvoko de mizera agoniado vane kompatata ! »

Krom aro da kuraĝaj kaj nelaceblaj kirurgoj, kies nomojn mi tre volus citi (ĉar ja se mortigi homojn estas glorigilo, ilin kuraci kaj resanigi — ofte per risko de sia propra vivo — certe meritas estimadon kaj dankadon), medicinaj studentoj alkuris el Bologna, Pisa kaj aliaj italaj urboj. Kanadana kirurgo, doktoro Norman Bethon, profesoro de anatomio en Toronto, helpis al tiuj sindonemaj viroj. Krom la Lombardanoj, pretervojaĝantaj Francoj, Svisoj, Belgoj klopodis utiladi, sed ili devis kontentiĝi nur per disdonado de oranĝoj, glaciaĵoj, kafo, limonadoj, tabako.

En Piacenza, kies tri hospitaloj estas administritaj de privatuloj kaj de sinjorinoj servantaj kiel flegistinoj, unu el tiuj ĉi lastaj, juna fraŭlino, vane petegata de sia familio ke ŝi ne pasigu ĉiujn tagojn en la hospitalo pro la tie estanta malbona febro, daŭrigis sian laboradon tiel volonte, tiel fervore kaj afable, ke ŝi estis estimegata de ĉiuj soldatoj : « Ŝi gajigas, ili diris, la hospitalon ».

Kiel utilegaj estus estintaj en la lombardaj urboj kelkaj centoj da volontaj flegistoj sindonemaj, spertaj kaj precipe antaŭe instruitaj ! Ili estus ĉirkaŭ si altirintaj la disajn helpantojn kaj disperdiĝantajn fortojn. Ne nur tempo mankis al tiuj homoj, kiuj estis kapablaj konsili kaj gvidi la ceterajn ; sed necesaj konoj, sperto malestis ĉe plej multo el homoj, kiuj povis proponi nur personan sindonemon nesufiĉan kaj ofte vanan. Kion povis fari ja ĉe tiel urĝa laboro, spite sia bonvolo, kelke da apartaj homoj ? Post kelkaj semajnoj la kompata entuziasmo malvarmiĝis ; kaj, ĉar burĝoj, tiel nespertaj kiel malsagacaj en sia helpado, iafoje alportis malsanigan nutraĵon al vunditoj, oni devis malpermesi al ili la eniron en la preĝejojn kaj hospitalojn.

Multaj personoj, kiuj estus konsentintaj pasigi ĉiutage unu aŭ du horojn ĉe malsanuloj, forlasis sian intencon, ĉar por tio estis necesa speciala permeso ricevebla nur per dispetado. La fremduloj pretaj por helpi renkontis ĉiaspecajn baraĵojn neatenditajn kaj taŭgajn por ilin mallogi. Sed volontaj hospitalistoj bone elektitaj kaj lertaj, senditaj de specialaj societoj kun permeso de la registaroj, kaj respektataj pro interkonsento inter la militantoj, estus renversintaj la baraĵojn kaj farintaj nekompareble pli da bono.

Dum la ok unuaj tagoj post la batalo, la vunditoj, pri kiuj la kuracistoj mallaŭte diras, preter-

irante iliajn litojn kaj ŝancelante la kapon : « Jam nenio farinda ! », ricevas preskaŭ nenian flegon kaj mortas forlasite. Kaj ĉu tio ĉi ne estas tute komprenebla, pro la malmulteco de la flegistoj kaj la multegeco de la vunditoj ? Malkompatema kaj kruela logiko trudis, ke oni lasu morti tiujn malfeliĉulojn sen ia plua zorgo kaj sen ofero de utilega tempo konservinda por resanigeblaj soldatoj ! Ili tamen estis multaj kaj ne surdaj, tiuj mizeruloj kontraŭ kiuj oni eldiris tiel senkompatan juĝon ! Baldaŭ ili rimarkas sian forlasitecon kaj ili elspiras la lastan spiron kun koro ŝirita, venenigita, dum neniu atentas ilin.

La finiĝo de tiu ĉi aŭ alia el ili estas ankoraŭ pli malgajigata, pli maldolĉigata de najbaro, juna soldato kuŝanta sur apuda matraco, malgrave vundita kaj kies malspritaj ŝercoj lasas al li nek ripozon nek trankvilecon. Ĉe alia flanko unu el liaj sammizeranoj ĵus elmortis tiamaniere, ke li, mortanta, devas ĉeesti funebran ceremonion multe tro rapide faritan, kiu montras al li antaŭe lian propran ! Fine, jam mortiĝanta, li devas ankoraŭ vidi kelke da homoj profitantaj lian malfortecon por esploradi lian vestujon kaj forŝteli tion, kio ŝajnas bona.

Por tiu mortanto jam ok tagojn kuŝas en la poŝtejo leteroj el lia familio ; se li havus ilin, por li lasta konsolo ili estus ; li petegis la flegistojn, ke ili alportu ilin, por ke li povu ilin legi antaŭ

sia lasta horo, sed tiuj ĉi senkompate respondis, ke ili ne havas tempon por tio, ĉar multe restas por fari.

Pli bone estus por vi, mizera martiro, se vi estus pereinta, mortige trafite, sur la buĉkampo, meze de tiuj belegaj abomenaĵoj, kiujn oni nomas « la gloro » ! Via nomo, almenaŭ, ne estus forgesita, se vi estus falinta apud via kolonelo, defendante la flagon de via regimento. Eĉ preskaŭ pli bone por vi estus estinta via dumviva enterigo, kiam la kamparanoj komisiitaj por tio relevis vin senkonscian sur la monteto de la Cipresoj, apud la Solferina turo aŭ en la Medole'a ebenaĵo ! Via agonio ne estus daŭrinta longe. Nun serion da agonioj vi devas suferi ; jam ne la honora kampo prezentiĝas al vi, sed la malvarma morto, kun ĉiuj siaj teruroj, kaj la vorto «malaperinta» anstataŭ funebra parolado !

Kio fariĝis la gloramo vigliganta tiun bravan soldaton ĉe la komenco de la militirado kaj dum tiu Solferina tago, kiam, riskante sian vivon, li tiel kuraĝege atencis kontraŭ la vivo de siaj similuloj, kies sangon li klopodis elverŝi tiel facilmove ? Kie estas la fervoro de la unuaj bataletoj ? Kie estas tiu neretenebla ekscitiĝo ? Kie estas tiu disvastiĝema entuziasmo, pligrandigita de la pulvodoro, de la militmuzika sonado, de la kanona bruado, de la kuglara siblado, kiuj forgesigas la danĝeron, la suferon, la morton ?

En tiuj multaj hospitaloj Lombardaj oni povis vidi kiakoste aĉetiĝas tio, kion la homoj nomas « la gloro » kaj kiom multekoste pagiĝas tia gloro !

La Solferina batalo estas la sola, kiu dum nia jarcento, estas komparebla per la sekvintaj perdoj, kun la bataloj ĉe Moskova, Leipzig kaj Waterloo.

Sekve de la 24-a de junio 1859, oni kalkulis, kiel mortintojn kaj vunditojn, en la militistaroj aŭstra kaj franco-sardinia, tri feldmarŝalojn, naŭ generalojn, 1566 ĉiagradajn oficirojn, el kiuj 630 aŭstroj kaj 936 liganoj, kaj ĉirkaŭ 40000 soldatojn aŭ suboficirojn.

Krom tio, de la 15-a de junio ĝis 31-a de aŭgusto, oni kalkulis en la hospitaloj en Brescia, laŭ la oficialaj statistikoj, 19,665 februlojn kaj aliajn malsanulojn, el kiuj pli ol 19000 estis el la franco-sardinia armeo.

Siaflanke la Aŭstroj havis almenaŭ 20000 malsanajn soldatojn en Venezia Lando, kaj 10000 vunditojn, kiuj, post Solferino, estis sendataj al Verona, kies troŝarĝitaj hospitaloj fine estis atakataj de hospitala putriĝo kaj tifuso.

Sekve al la 40000 mortigitoj kaj vunditoj dum la 24-a de junio, oni devas aldoni pli ol 40000 malsanulojn, februlojn aŭ mortintojn pro malsano, ĉu pro la sekvoj de la troa laciĝo suferita dum la batalo aŭ dum la najbaraj tagoj, ĉu pro la malsaniga efiko de la varmega vetero en la Lombardaj ebenaĵoj, ĉu fine pro la nesingardemo de la soldatoj.

Se oni ne konsideras la militistan vidpunkton, la batalo apud Solferino estis do, *el la vidpunkto de la homaro*, katastrofo, tiel diri, tuteŭropa.

La veturado de la vunditoj de Brescia al Milano, kiu fariĝas dum la nokto por eviti la varmegan veteron dumtagan, prezentas draman vidaĵon kun la vagonaroj ŝarĝitaj per kripligitaj soldatoj alvenantaj en stacidomon embarasatan de admiranta popolaro.

Lumigata de pala lumo de rezintorĉoj, la homamaso ŝajne retenas sian spiron por aŭskulti la ĝemojn, la mallaŭtajn plendojn alvenantajn al ĝi.

La Aŭstroj, forirante, diversloke rompis la fervojon inter Milano kaj Brescia ; tiu ĉi vojo estis reveturebligata en la unuaj tagoj de julio por la transportado de la municioj, de la materialo kaj nutraĵoj sendataj al la ligarmeo : la malplenigo de la hospitaloj en Brescia estis tiamaniere faciligata.

En ĉiu stacio, longaj kaj mallarĝaj barakoj estas konstruitaj por akcepti vunditojn. Tiuj ĉi, eltirite el vagonoj, estas metataj sur matracojn laŭlinie aranĝitajn unu apud la alia. Sub tiuj tegmentaĵoj oni starigis tablojn kun pano, buljono, limonado, vino, akvo, ĉarpio, tolo, bendetoj. Kandeloj, portataj de junuloj loĝantaj en la loko, kie haltis la vagonaro, lumigas la mallumaĵon. Lombardaj urbanoj rapidas al la Solferinaj venkintoj por prezenti al ili sian dankan oferon : dum respekta silentado

ili bandaĝas la vunditojn, kiujn ili eltiris zorgege el la vagonoj por ilin meti sur la litojn por ili pretigitajn. La tieaj sinjorinoj proponas refreŝigajn trinkaĵojn, ĉiaspecajn manĝaĵojn, kiujn ili disdonas en la vagonoj al tiuj, kiuj senhalte veturas ĝis Milano.

En tiu ĉi urbo, kien alvenas ĉirkaŭ mil vunditoj ĉiunokte, dum kelkaj noktoj senpaŭze, la Solferinaj martiroj estas afablege akceptataj. Jam ne rozfoliojn disŝutas el flagornamitaj balkonoj de luksegaj palacoj de la Milana nobelaro, sur brilajn epoletojn kaj sur ore kaj emajle striitajn ordenaĵojn, la delikataj kaj belaj nobelinoj, ankoraŭ pli beligataj de l'entuziasma ekscitiĝo. Nun, dankadante, ili elverŝas kompatajn larmojn, kiuj tradukiĝos per sindonemo kaj memforgeso.

Ĉiuj familioj disponantaj unu veturilon iras al la stacidomo por veturigi vunditojn. La nombro de la veturiloj senditaj de la Milananoj eble superas kvin cent. La plej belaj kaleŝoj egale kiel la plej modestaj veturiletoj estas ĉiuvespere sendataj al *Porta Tosa*, kie staras la stacidomo de la Venezia fervojo. La italaj sinjorinoj konsideras, ke ilia devo ordonas, ke ili metu mem en siajn riĉajn veturilojn — kiujn ili provizis per matracoj, littukoj, kapkusenoj — la gastojn difinitajn por ili kaj kiujn transportas mem la lombardaj grandsinjoroj helpataj de sia ne malpli komplezema servistaro.

La popolamaso aplaŭdas dum ilia preterirado tiujn honormartirojn. Respekte ĝi deprenas la ĉa-

pelojn ; ĝi sekvas la malrapidan iradon de la veturilaroj kun torĉoj iluminantaj la melankoliajn vizaĝojn de vunditoj, kiuj klopodas por rideti. Ĝi akompanas ilin ĝis sojlo de la gastaj palacoj, kie plej akurataj flegoj atendas ilin.

Ĉia familio volas ricevi francajn vunditojn kaj per ĉiaspecaj komplezajoj klopodas por malpli maldolĉigi la malproksimecon de patrujo, de gepatroj, de amikoj.

Sed post malmulte da tagoj, la plej multo el la Milanaj loĝantoj devas remeti en la hospitalojn la vunditojn, kiujn ili akceptis hejme, ĉar la Administracio deziras eviti tro vastan disecon de la flegotoj kaj plian laciĝon de la kuracistoj. Antaŭ Solferino, la Milanaj hospitaloj jam enhavis ĉirkaŭ naŭ mil vunditojn, el la antaŭaj bataloj.

La Milanaj nobelinoj maldormas apud la litoj de simplaj soldatoj, kies gardantaj anĝeloj ili fariĝas : grafino Verri, naskita Borromeo, Sinjorino Uboldi de Capei, Sinjorino Boselli, Sinjorino Sala-Taverna, grafino Taverna, kaj multaj aliaj, forgesinte siajn elegantajn kutimojn, pasigas tutajn monatojn apud tiuj suferlitoj. Kelkaj el tiuj sinjorinoj estas patrinoj, kies funebraj vestoj rememorigas pri freŝaj doloraj perdoj. Unu el ili diris : « La milito forrabis la plej maljunan el miaj filoj ; li mortis antaŭ ok monatoj pro sekvoj de kuglo ricevita, batalante kun la franca armeo apud Sebastopol. Kiam mi eksciis, ke en Milanon

venas francaj vunditoj kaj ke mi povos ilin flegi, mi sentis, ke Dio sendas al mi la unuan konsolon. . . »

Grafino Verri-Borromeo, prezidantino de la centra komitato por helpoj, gvidas la grandan tenejon de tolaĵo kaj ĉarpio. Spite sia maljuna aĝo, ŝi pasigas multajn horojn ĉiutage, legante por la malsanuloj.

Ĉiuj palacoj enhavas vunditojn. Tiu de familio Borromeo entenas tri cent. La estrino de Ursulinoj, fratino Marina Videmari, hospitaligis sian monaĥejon kaj servas en ĝi kune kun siaj kunulinoj: tiu monaĥeja hospitalo estas modelo por ordo kaj pureco.

Markizino Pallavicini-Trivulzio, kiu prezidas la grandan Torinan komitaton kun admirindaj sindonemo kaj memforgeso, kolektas la donacojn el diversaj urboj kaj landoj; dank' al ŝia agemo, la tenejoj en Milano, sidantaj *contrada San Paolo*, ĉiam restis bone provizitaj.

Post kelkaj semajnoj en la Milanaj stratoj marŝas malgrandaj rotetoj da francaj soldatoj resaniĝantaj, kiuj malgaje reiras al Francujo; unuj tenas brakon en skarpo; aliaj estas subtenataj de lambastonoj aŭ prezentas postsignojn de vundoj. Iliaj uniformoj estas eluzitaj, disŝiritaj, sed ili havas belegan korpotolaĵon, kiun riĉaj Lombardanoj malavare ŝanĝis kontraŭ iliaj sangoplenaj ĉemizoj.

« Via sango elfluis por defendi nian landon, ili diris, kaj ni volas konservi rememorajon pri ĝi ». Tiuj viroj, antaŭ nelonge fortaj, fortikaj, nun senigitaj je brako, kruro, aŭ kun kapo envindita, rezigne suferas sian malfeliĉon. Sed jam nekapablaj daŭrigi militistadon kaj perlabori panon por siaj familioj, ili jam maldolĉe antaŭvidas sin, post reveno en la naskolando, kiel kompatiduloj malfacile elportataj de la aliaj kaj de si mem.

En unu el la Milanaj hospitaloj, serĝento el la gvardiaj zuavoj, kun energia kaj fiera vizaĝo, estis amputita je unu kruro kaj elportis tiun operacion sen ia plendo. Kelke da tempo post tio ĉi, li estis kaptata de malluma malgajeco, kvankam lia farto pliboniĝis kaj lia resaniĝo rapide fariĝis. Tiu malgajeco kreskanta ĉiutage estis nekomprenebla. Monaĥino, ekvidante larmojn sur liaj okuloj, tiel insiste demandadis lin, ke li fine konfesis, ke li estas subtenanto de sia grandaĝa kaj kripla patrino, al kiu li sendis ĉiumonate kvin frankojn el sia salajro. Li diris krom tio, ke ĉar nune li tute ne povas helpi al ŝi, la kompatindulino verŝajne tre multe bezonas monon. La monaĥino, kortuŝita de kompato, donacis al li kvinfrankan moneron, kies valoro estis tuj sendata Francujon. Kiam la hospitalestrino volis fari al li novan donacon, li malakceptis kaj diris, dankante: « Konservu tiun monon por aliaj, kiuj bezonas ĝin pli ol mi; mi esperas, ke dum la proksima monato mi povos sen-

di ŝian monon al mia patrino, ĉar espereble mi baldaŭ povos labori ».

Milana sinjorino, havanta fame gloran nomon, aranĝigis en unu el siaj palacoj cent kvindek litojn por vunditoj. Inter la soldatoj loĝantaj en tiu belega domo estis grenadisto el la 70-a regimento de la infanterio franca, kiu, suferinte amputon, estis minacata de la morto. Tiu sinjorino klopodis konsoli la vunditon, parolante al li pri lia familio. Li rakontis ke li estas sola filo de malriĉaj kamparanoj en la Gers'a departemento kaj ke li tre malĝojas lasi siajn gepatrojn en mizero, ĉar li sola zorgas pri ilia subtenado. Li diris krom tio, ke lia plej granda konsolo, antaŭ ol morti, estus kisi sian patrinon. Ne dirante al li sian projekton, la nobela Milananino subite decidiĝas forlasi Milanon, veturas en la Gers'an departementon al tiu familio, kies adreson ŝi notis, kunprenas la patrinon de la vundito post donaco de granda monkvanto al la maljuna kripla patro, veturigas kun si la humilan vilaĝaninon al Milano; kaj ses tagojn post la konfeso de la grenadisto, la filo kisis sian patrinon, plorante kaj benante sian bonfarantinon.

Sed kiabezone rememorigi pri tiom multaj doloraj kaj malgajegaj scenoj kaj tiamaniere kaŭzi malagrablan kortuŝadon ? Kial rakontadi kompleze plorindajn detalojn kaj restadi ĉe mallumegaj prezentaĵoj ?

Tiun tre naturan demandon ni respondos per alia demando.

Ĉu ne estus ebla fondi en ĉiuj Eŭropaj landoj helpajn Societojn, kies celo estus, dum milito, flegadi per volontuloj la vunditojn, ne atentante pri ilia nacieco?

Ĉar oni volas, ke ni forlasu la dezirojn kaj esperojn de la Societoj de l'Amikoj de Paco, la belajn revojn de abato de Saint-Pierre kaj grafo Sellon; ĉar homoj daŭrigas mortigi sin reciproke sen malamo kaj ĉar la plej alta grado de la gloro estas, dum milito, la kiel eble plej multa mortigado de aliaj homoj; ĉar oni ankoraŭ kuraĝas eldiri, laŭ la aforismo de grafo Joseph de Maistre, ke la « milito estas dia »; ĉar oni elpensas ĉiutage kun obstinemo inda je pli bona celo, detruilojn ĉiam pli terurajn kaj ĉar la elpensintoj de tiuj mortigiloj estas kuraĝigataj en ĉiuj Eŭropaj regnoj, kiuj vete armadas sin; — kial oni ne profitus momenton da kompara trankvileco kaj kvieteco, por solvi la demandon, kiun ni ĵus starigis, kaj kiu estas tiel ĉefe grava, el la duobla vidpunkto de la homaro kaj de kristanismo?

Post ĝia prezentiĝo al la pripensado de ĉiu homo, tiu temo verŝajne elvokos opiniojn kaj verkojn de personoj pli kompetentaj; sed ĉu unue tiu ideo, prezentita al la diversaj branĉoj de la granda Eŭropa familio, ne devas fiksi sur si atenton kaj altiri la simpation de ĉiuj, kiuj posedas altan spi-

riton kaj koron kapablan tuŝiĝi de la suferoj de de iliaj similuloj ?

Tia estas la celo, por kiu estas verkita tiu libro.

Tiaspecaj Societoj, post ilia fondo, konstante ekzistante, troviĝus tute pretaj en la momento de milito. Ili devus akiri la favoron de la aŭtoritatuloj en la lando, kie ili naskiĝus kaj peti, en okazo de milito, de la regnestroj de la militantaj nacioj, permesojn kaj faciligojn por konvene trafi sian celon. Tiuj Societoj devus do havi, kiel membrojn de la supera gvida komitato, kaj por ĉiu lando, homojn plej honorindajn kaj estimatajn.

En la momento de militkomenco, la komitatoj alvokus al tiuj personoj, kiuj dezirus nedaŭre dediĉi sin al tiu entrepreno, kiu konsistus helpi kaj flegi, sub gvidado de spertaj kuracistoj, la vunditojn unue sur la batalkampo, poste en la ambulancoj kaj hospitaloj.

La propramova sindonado ne estas tiel malofta, kiel oni povus kredi. Multe da personoj, tiam certaj, ke ili povos faradi kelke da bono, estante helpataj kaj faciligataj de la supera Administracio, certe plenumus taskon esence bonfareman, kaj kelkaj farus tion je siaj propraj elspezoj. Dum nia egoisma jarcento, kia allogo estus por la grandanimuloj, por la kavaliruloj, tia elmetiĝo al samaj danĝeroj, kiel la militisto, kun tute volonta misio paciga kaj konsola !

La historio pruvas, ke neniel ĥimere estas esperi tiajn sindonemojn. Du nuntempaj faktoj speciale ĵus konfirmis tion. Ili okazis dum la Orienta milito kaj proksime rilatas nian temon.

Dum karitataj fratinoj flegadis la vunditojn kaj malsanulojn de la franca militistaro en Krimeo, en armeojn rusan kaj anglan venis el Nordo kaj Okcidento du aroj da sindonemaj flegistinoj.

Sinjorino granddukino Heleno Pavlovna de Rusujo, naskita princino Karlino von Wurttenberg, vidvino de grandduko Mikaelo, dungis preskaŭ tri cent sinjorinojn el Sankt-Peterburgo kaj Moskvo, por servi kiel flegistinoj en la Krimeaj rusaj hospitaloj ; ŝi provizis ilin per ĉio necesa kaj tiuj sanktaj virinoj estis benataj de miloj da soldatoj.

En Anglujo, miss Florence Nightingale ricevis insistan alvokon de lord Sidney Herbert, sekretario de la Milita Oficejo de la Brita Imperio, por ke ŝi helpu al la anglaj soldatoj en Oriento. Tiu sinjorino ne ŝanceliĝis laboradi persone kun granda sindonemo. En novembro 1854, ŝi iris Konstantinoplon kaj Skutari'on kun tridek sep anglaj sinjorinoj, kiuj, apenaŭ alveninte, flegadis la multajn vunditojn el Inkermann'a batalo. En 1855, miss Stanley venis partopreni ŝian laboradon kune kun kvindek novaj kunulinoj ; tiu cirkonstanco ebligis, ke miss Nightingale iru Balaklavon por inspekti la tieajn hospitalojn. La figuraĵo de miss Florence Nightingale, trairanta dum la nokto, kun lampeto

en la mano, la vastajn litejojn de la militistaj hospitaloj kaj notanta la staton de ĉiu malsanulo, neniam forviŝiĝos el la koro de la viroj, kiuj estis ŝiaj flegatoj aŭ de tiuj, kiuj vidis ŝian admirindan bonfaremon, kaj ĝia memoro restos gravurita en la historio.

El la multego da similaj bonfaradoj, antikvaj aŭ modernaj, kies plej multaj restadis senfamaj kaj nekonataj, kiom restadis vanaj, ĉar ili estis izolaj kaj ne estis subtenataj de opaj simpatioj, sagace kunligitaj por komuna celo !

Se volontaj hospitalistoj estus troviĝintaj en Castiglione, la 24-an, 25-an, 26-an de junio, kaj ankaŭ en Brescia, en Mantova, en Verona, kiom da bono ili povus fari !

Kiom multe da homaj estaĵoj ili estus savintaj el morto dum la fatala nokto vendreda, dum ĝemoj, korŝiraj petegoj ellaŭtiĝis el brustoj de miloj da vunditoj elportantaj la plej akrajn dolorojn kaj turmentataj de la neesprimebla suferado de l'soifo !

Se princo von Isenburg estus pli baldaŭ relevita de kompatemaj manoj el la sangoplena kampo, sur kiu li kuŝis svene, li ne estus devinta suferadi dum kelkaj jaroj vundojn pligravigitajn de longa forlasateco. Se lia ĉevalo ne estus montrinta lin inter mortintoj, li estus pereinta pro manko de helpo, kune kun tiom multaj aliaj vunditoj, kiuj ankaŭ estis kreitaĵoj de Dio kaj kies morto povis esti egale kruela por iliaj familioj !

La bonaj maljunulinoj, la belaj junulinoj Casti-

glione'aj ne povis savi la vivon de multaj el tiuj, kiujn ili flegis! Krom ili, estas bezonaj homoj spertaj, lertaj, decidemaj, antaŭe ekzercitaj por agadi orde kaj akorde, sola maniero por averti la malfeliĉaĵojn, kiuj pligravigas la vundojn kaj faras ilin mortigaj.

Se oni estus havinta sufiĉe da helpantoj por baldaŭ relevi la vunditojn sur la ebenaĵo Medole'a, en la kavaĵoj San-Martinaj, sur la krutaĵoj de monto Fontana, sur la montetoj Solferinaj, oni ne estus lasinta dum longaj horoj, en terura timado, la kompatindan bersaglieron, la hulanon aŭ la zuavon, kiuj klopodis por sin leveti malgraŭ kruelega doloro kaj vane gestadis por ke oni direktu portilon al li. Fine, oni estus evitinta la riskon enterigi vivantojn kun la mortintoj!

Pli perfektaj transportaj rimedoj estus ebligintaj eviti al tiu voliĝero de la gvardio tiun teruran amputon, kiun li devis suferi en Brescia, ĉar tre bedaŭrinde li ne estis sufiĉe flegata dum la vojirado de la batalkampo ĝis Castiglione.

La vidaĵo de tiuj junaj kripluloj, senigitaj je unu brako aŭ unu kruro, malgaje revenantaj en siajn hejmojn, vere elvokas konsciencajn riproĉojn, ke oni ne pli klopodis por antaŭe averti la malbonajn sekvojn de vundoj, kiuj, ofte, estus resanigeblaj per ĝustatempa helpado.

Ĉu tiuj mortintoj, forlasitaj en la Castiglione'aj ambulancoj, en la hospitaloj en Brescia — el kiuj multaj ne povis komprenigi sin pro malsameco de lingvoj — estus ellasintaj la lastan spiron, malbenante, blas-

femante, se ili estus havintaj apud si kompatemulon por ilin aŭskulti, por ilin konsoli ?

Malgraŭ la oficialaj helpoj, malgraŭ la fervoro de la Lombardaj urboj, multege restis por fari, kvankam en nenia milito oni ankoraŭ vidis tiel grandan bonfaremon ; tamen ĉio ĉi estis neproporcia kun la grandaj helpindaj malfeliĉaĵoj.

Por plenumi tiel noblan taskon, ne estas uzindaj pagatoj, kiujn la naŭzo forpelas, kiujn la laciĝo faras nesentemaj, senkompataj mallaboremaj. Oni bezonas tujan helpadon, ĉar kio povas, hodiaŭ, savi vunditon, tio ne savos lin morgaŭ ; kaj perdante tempon, oni alpermesas la gangrenon, kiu kondukas al la morto. Oni devas havi volontajn flegistojn, antaŭe ekzercitajn, kutimigitajn je la afero kaj kiuj, oficiale akceptitaj de la estroj de la militantaj armeoj, estu helpataj plenumi sian taskon.

Tiuj flegistoj devas havi lokon ne nur sur la batalkampo, sed ankaŭ en la hospitaloj, kie la semajnoj forpasiĝas longaj kaj doloraj por la vunditoj sen familio kaj sen amikoj. Dum tiu mallonga Italuja milito soldatoj estis tiagrade kaptataj de la patruja sopirego, ke sen alia kaŭzo, sen ia vundo, ili mortis. Aliparte la Italoj — kaj tio ĉi estas komprenebla — proksimume interesiĝis nur pri la vunditoj de la Ligarmeo kaj okupis sin nur tre malmulte pri la suferantaj Aŭstroj. Estas vere, ke troviĝis en Italujo kuraĝaj virinoj, kies pacienco kaj persistemo ne laciĝis ; sed bedaŭrinde, oni en la fino povis facile ilin kalkuli ; la kontaĝiaj

febroj forpelis multajn personojn, kaj la flegistoj kaj servistoj ne ĉiuj konfirmis longatempe tion, kion oni povis esperi de ili. Cetere la personaro de la militistaj ambulancoj estas ĉiam nesufiĉa : kaj eĉ se oni ĝin igus duobla aŭ triobla, ĝi ankoraŭ restus nesufiĉa. Oni nepre devas alvoki al la publiko, oni ne povas, oni neniam povos eviti tion. Nur per la kunlaboro de tiu ĉi lasta oni povas esperi, ke oni iom malgrandigos la suferojn kaŭzatajn de la milito.

Tial do oni devas fari alvokon, prezenti peton al la homoj en ĉiuj landoj, en ĉiuj klasoj, al potenculoj, kaj al la plej modestaj metiistoj, ĉar ĉiuj povas, per tiu ĉi aŭ alia maniero, ĉiu en sia kampo, laŭ sia forto, iamaniere kunhelpi al tiu bonfarado.

Tiu alvoko celas la virinojn, kiel la virojn, la reĝinon, la princinon starantan sur la ŝtuparo de trono, kiel la humilan servistinon orfan kaj bonfareman, aŭ la malriĉan vidvinon izoligitan sur la tero kaj dezirantan oferi siajn lastajn fortojn por la bono de aliaj.

Tiu alvoko celas la generalon, la marŝalon, la militministron, kiel la verkiston, la literaturiston, kiu, per siaj publikaĵoj, povas talente paroli por entrepreno interesanta la tutan homaron, ĉiun popolon, ĉiun landon, eĉ ĉiun familion, ĉar neniu povas diri, ke li estas certe ekster la milita danĝero.

Se aŭstra generalo kaj franca generalo, batalinte unu kontraŭ la alia en Solferino, povis baldaŭ poste, sidi unu apud la alia ĉe la gasta tablo de Prusa reĝo kaj

amikeme kunparoladi, kio povus ilin malhelpi en la konsiderado kaj diskutado de demando tiel inda je ilia interesiĝo kaj atento ? Dum la grandaj soldataj manovroj apud Kœln, en 1861, la reĝo Vilhelmo el Prusujo invitis vespermanĝi en la Benrath'an kastelon, apud Dusseldorf, la diversnaciajn oficirojn, kiuj estis senditaj de siaj registaroj. Antaŭ ol veni al la tablo, la reĝo prenis la manojn de generaloj Forey kaj Baumgarten : « Nun, ĉar vi estas amikoj, li diris, ridante, sidiĝu tien, unu apud la alia, kaj babilu ». Nu, Forey estis la venkinto apud Montebello kaj Baumgarten, lia kontraŭulo.

Ĉu, en eksterordinaraj okazoj, kiam ekzemple en Kœln, Châlons, aŭ aliloken kunvenas eminentuloj de la militarto el diversaj nacioj, ne estas dezirinde, ke tiu kvazaŭ kongreso akceptu ian internacian regulon, interkonsentitan kaj garantiitan, kiu, post aprobo kaj konfirmo, estus fundamento por starigo de *Societoj por Helpado al Vunditoj* en la diversaj Eŭropaj landoj ? La antaŭa interkonsento kaj pretigado de l'afero estas des pli grava, ke, kiam ekkomencis la malamikado, la militantoj estas jam malfavoraj unu kontraŭ la alia kaj jam konsideras ĉiujn demandojn nur el la vidpunkto de siaj solaj partianoj.

Ĉu oni ne kunvokas malgrandajn kongresojn de scienculoj, juristoj, medicinistoj, agronomoj, statistikistoj, ekonomiistoj, kiuj kolektiĝas nur por trakti multe malpli gravajn demandojn ? Ĉu ne ekzistas Societoj internaciaj, kiuj okupas sin pri publika bonfarado kaj

utilado ? Ĉu oni ne povus simile kunveni por solvi problemon tiel gravan, kiel tiun pri flegado al viktimoj de l'milito ?

La humaneco kaj civilizeco nepre postulas la efektivigon de tia verko : ĝi estas devo, kies plenumon devas helpi ĉiu bona homo, ĉiu persono posedanta ian influon.

Kia princo, kia regnestro volus rifuzi sian subtenon al tiaj Societoj kaj ne estus kontenta, ke li povas tute certigi al siaj soldatoj tujan kaj konvenan flegadon en okazo de vundiĝo ?

Dank'al Societoj, kiel mi proponas, oni evitos multe da perdoj kaj malŝparoj de la mono kaj objektoj sendataj helpe. — Dum la Orienta milito, oni sendis de Peterburgo al Krimeo grandegan kvanton da ĉarpio pretigita de rusaj sinjorinoj ; sed la pakaĵoj, anstataŭ trafi la hospitalojn, al kiuj ili estis senditaj, alvenis en paperfabrikejojn, kiuj uzis ĉion por sia industrio.

Pli perfektigante la transportajn rimedojn, avertante la akcidentojn dum la veturado de la batalkampo al la ambulanco, oni evitos multe da amputoj kaj oni proporcie malpligrandigos la ŝarĝon de la registaroj, kiuj donas pension al la militkripluloj.

Tiuj Societoj povus ankaŭ esti utilegaj, pro sia permanenta ekzistado, dum epidemioj, subakviĝoj, grandaj brulegoj kaj aliaj neatendataj katastrofoj : la bonfaremo, kiu estus ilin naskinta, instigus ilin agadi en ĉiuj okazoj, ĉe kiuj ilia laborado estus dezirinda.

Tiu entrepreno necesigos la sindonemon de kelka kvanto da homoj, sed ne la mono certe mankos al ĝi en okazo de milito. Ĉiu alportos sian oferaĵon aŭ sian kompataĵon por respondi la alvokojn, kiuj estos faritaj de la Komitatoj. Nacio ne restas indiferenta kontraŭ siaj idoj, batalantaj por ĝia defendo. La malfacilaĵo ne kuŝas tie ; sed la problemo staras tute en la serioza preparado, kaj en ĉiuj landoj, de tiaspeca entrepreno, en la kreado mem de tiuj Societoj.

Por fondi la Komitatojn, kiuj gvidos la Societojn, estas necesa, en ĉiu lando, nur iom da bonvolo de kelkaj honorindaj kaj persistemaj homoj. Tiuj Komitatoj, havantaj internacian spiriton bonfareman, kreus estraron latantan de flegistoj, kvazaŭ stabon. La Komitatoj de la diversaj nacioj, kvankam sendependaj unu de la alia, facile povus akordiĝi kaj interkomuniki, kunveni kongrese, kaj, en okazo de minacanta milito, agadi por la bono de ĉiuj.

Se la teruriĝaj detruiloj nun posedataj de la popoloj, ŝajnas, mallongigos la militojn, ĉu kompense la bataloj ne estos pli mortigaj ? Kaj en tiu ĉi jarcento, kiam la neatendito havas tiel gravan rolon, ĉu militoj ne povas okazi tie ĉi aŭ tie, laŭ plej subita, plej neatendita maniero ?

Ĉu tiuj pripensoj ne entenas motivojn pli ol sufiĉajn, por ke oni lasu nenion senprepare ?

ELDONOJ DE LA SOCIETO « PACIFISTO »

I. Espero Pacifista

monata organo de la Societo.

La plej internacia el la pacifismaj gazetoj. Enhavas artikolojn kaj zorge kontrolitajn dokumentojn pri armadoj kaj militfaktojn, juro internacia kaj arbitracio, pacifisma movado, politiko internacia kaj kolonia, internaciismo, esperantista movado, k. c.

Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo) 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo ; tiu ĉi akceptas opajn aliĝojn (vidu regularon).

Sin turni al S-ro **Gaston Moch**, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (Francujo).

II. Libraro Pacifisma

(Adresi la mendojn al la **Presa Esperantista Societo**, 33, rue Lacépède, Paris.)

La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.

La prezoj inter krampoj estas rabate difinitaj por la membroj de la Societo « Pacifisto ».

La luksaj eldonoj konsistas el malmultaj numeritaj ekzempleroj, sur luksa papero.

1. *Historio resuma de l'Arbitracio konstanta*, kun 6 grafikaĵoj, de **Gaston Moch**. 15 cent. — **30 cent.**
2. *Rememoro pri Solferino*, de **Henri Dunant**, traduko de Vaillant kaj Fruictier, kun portreto. 1,— — **1,15** — [**0,60**].
   Luksa eldono. **2,—**
3. *La Fundamentoj de l' Pacifismo*, de **Elie Ducommun**, traduko de Victor Dufeutrel. 0,50 — **0,55** [Aldono].
   Luksa eldono. **1.—**

EN PREPARO :

Ili estis frenezaj, de **Octave Mirbeau** kaj *Ruĝa Rido*, de **Leonid Andrejev**, tradukoj de Louis Segretinat kaj F. Avilov.

Johano de Bloch kaj liaj instruoj pri estonta milito, de **Frédéric Passy**, S-ino **de Suttner**, **P. Nattan-Larrier**, kaj kapitano **Alesiano**, tradukoj de F-ino Royer, Fritz Schuck kaj Alesiano, kun portreto.

Paco kaj milito, de profesoro **Charles Richet**, traduko de D-ro Vallienne.

Por Arbitracio, de **Andrew Carnegie**, kun antaŭparolo de senatano **d'Estournelles de Constant**, tradukoj de W. W. Padfield kaj Henri Maresquelle.

BUCHBINDEREI
Karl HOFFMANN
Tel.: 813 35 76
1120 Wien, Fockygasse 43